



HUNGARA VIVO

6
1974
8, - Ft



LEHEL 210/60

**KOMPRESORA
DOMMASTRUMA
FRIDUJO**

HAVEBLA:
en Modelvendejo de Fridujfabriko
Budapest, V., Sütő u. 2.

PRODUKTAS:
Fridujfabriko (Hütögépgyár,
Jászberény)



Hungaraj scienculoj

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XIV. jaro. 1974. 6-a numero

Numero pri la hungara scienco

ENHAVO

D-ro <i>A. Máthé</i> : Hungaraj scienculoj	1
Televida intervjuo kun d-ro <i>Albert Szent-Györgyi</i> , hungara Nobel-premiito	3
D-ro <i>L. Lesznai</i> : Muzikscienco en Hungario	6
<i>J. Mátéffy</i> : Mezepokaj arttrezoroj en la tero	7
Panoramo (<i>Szilárd Bálint</i>)	9
<i>Tibor Déry</i> : Amo — Tr. <i>K. Kalocsay</i>	10
<i>William Auld</i> : Francis, „la sobra intelekto”	16
La 16-a seminario en Zánka	17
D-ro <i>F. László</i> : Krom Balatono nia plej granda lago estas Venleno	20
<i>István Kovács</i> : Esperanta pup-teatro	24
<i>István László</i> : Utiligo de niaj termo-akvoj helpe de UN	25
Kultura plano de la fergisa brigado „Paco” de la Budapeŝta Maŝinfabriko „4-a de aprilo”	25
<i>Lajos Tárkony</i> : Revuo de revuoj	28
<i>Sándor Szathmári</i> (1897—1974)	29
<i>Reto Rossetti</i> : Responde al Edwin de Kock	29
<i>V. Benczik</i> : Recenzoj	30
Krucvortenigmo	31
Ekzameno sen risko	31
<i>V. B.</i> : De Adisabebo ĝis Budapeŝto	32

Sur la titolpaĝo:
Albert Szent-Györgyi

Ciu nacio havas siajn reprezentantojn en panteono de scienco. Dum longaj jarcentoj en la pasinto ankaŭ hungaraj sciencistoj kontribuis, verkis por la tutmonda scienco kaj ili aldonas ankaŭ nuntempe kelkajn brikojn al la giganta konstruaĵo de la universala scienco.

Ce la taksado de personaj meritoj la monda faka publiko distingas kelkajn hungarajn eminentulojn. Ilia verkaro faras gravan parton de la hungara kulturtrezoro.

*

Donát Bánki (1859—1922): mekanika inĝeniero, profesoro ĉe Teknika Universitato de Budapest; kune kun *János Csonka* ili inventis la karburilon por benzinatoroj.

Robert Bárány (1876—1936): hungardevena kuracisto, laŭreato de Nobel-premio (1916), profesoro en Vieno kaj poste en Uppsala. Li ricevis sian altan distingon pro esploroj pri ekvilibro-organo de interna orelo.

Ottó Bláthy (1860—1939): mekanika inĝeniero, pioniro de elektrotekniko, unu el la inventintoj de la transformatoro.

János Bolyai (1802—1860): unu el la plej grandaj matematikistoj de la pasinta jarcento. Sendepende de *Lobaĉevskij* ankaŭ li ellaboris la principojn de la ne-Eŭklida geometrio.

Jenő Cholnoky (1870—1950): geografo, universitata profesoro, faris sukcesajn esplorvojaĝojn en Orienta Azio.

Lóránd Eötvös (1848—1919): fizikisto, universitata profesoro. Li starigis matematikan formulon por priskribo de kapilaraj fenomenoj. Lia invento — la torda pendolo — pere de preciza mezuro de



Sándor Körösi Csoma

gravito estis uzebla determini la riĉajn subterajn petroltrovejojn de Texas kaj Venezuela.

Gábor Dénes (1900—): hungardevena angla profesoro de aplikita elektrofiziko ĉe Londona Universitato. Pro pioniraj esplorlaboroj sur tereno de holografio li ricevis Nobel-premion en 1971.

Gyula Germanus (1884—) scienculo de araba lingvistiko kaj literaturo. Multe vojaĝis oriente, prelegis en turkaj, egiptaj, hindaj universitatoj. Membro de la araba Scienca Akademio en Kairo. Abunde verkis ankaŭ arablingve, interalie pri modernaj movadoj en la islamo kaj pri la renoviĝo de la araba spirito.

László Heller (1907—): universitata profesoro, okupiĝas pri problemoj de varmotekniko kaj energimastrumado. Unu el la inventintoj de seka malvarmiga turo, tre grava aparato por uzinoj, energicentraloj funkciaj en teritorio malriĉa je akvo.

György Hevesi (1885—1966): hungardevena fiziko-kemiisto, vivinta ĉefe en Svedio. Eltrovis novan elementon (hafnio) kaj ricevis Nobel-premion en 1943.

Ányos Jedlik (1800—1895): fizikisto, universitata profesoro. Li pruvis unue, ke sur la bazo de elektro-magneta efiko oni povas konstrui turnaparaton. En 1861 —



Gyula Germanus

ses jarojn antaŭ Siemens — li konstruis la unuan dinamon. En 1848 li estis la unua universitata profesoro, kiu prelegis en hungara lingvo.

Kálmán *Kandó* (1869—1931): mekanika inĝeniero, pioniro en e-

György Lukács



lektizado de fervojoj. Ellaborinto de fazoŝanĝa sistemo, konstruinto de elektra lokomotivo uzanta 50-periodan alternan kurenton.

Sándor *Kőrösi Csoma* (1784—1842): mondvojaĝanta, pionira esploristo de la tibeta lingvo kaj literaturo.

György *Lukács* (1885—1971): marksista filozofo, estetikisto. Dum la Konsilantara Respubliko li estis popolkomisaro, poste li devis forlasi Hungarion, vivis en Aŭstrio, Germanio kaj en Sovetunio. Lia vasta agado ampleksas preskaŭ ĉiujn branĉojn de estetiko.

János *Neumann* (1903—1957): En la lastaj 20 jaroj de sia vivo li okupiĝis pri teoriaj problemoj de komputiloj kaj aŭtomatoj. Oni konsideras lin eltrovinto de la nuntempaj elektronikaj kalkulmaŝinoj.

József *Petzvál* (1807—1891): vivis en Aŭstrio, estis unu el la pioniroj de fotografado. Uzis la unua objektivan lenŝon por celo de fotografado, kaj efektivigis multajn aliajn siajn inventojn por perfektigi la fotografilojn.

Tivadar *Puskás* (1844—1893): estis kunlaboranto de Edison. Pus-

kás inventis la telefoncentralon kaj elpensis la unuan perdratan informilon.

János *Selye* (1907—): hungardevena kanadano, fiziologo, preskribinto de fenomeno „streso”.

Ignác *Semmelweis* (1818—1865): budapeŝta obstetrikisto, „savanto de la patrinoj”, kiu trovis la kaŭzon de la akuŝa febro kaj inventis medikamenton kontraŭ ĝi.

Albert *Szent-Györgyi* (1893—): biokemiisto, atingis mondfamon per separado de vitamino C el la papriko. Li ricevis pro tio Nobel-premion en 1937. Ekde 1949 li vivas en Usono. Dum la lastaj jaroj li sukcese esploras la kaŭzojn de kancero.

Leo *Szilárd* (1898—1964): fizikisto, vivinta en Usono; unu el la elpensintoj kaj efektivigantoj de la unua atom-reaktoro.

Edvárd *Teller* (1908—): hungardevena usona atomfizikisto. Li multe kontribuis al teorio kaj efektivigado de fuzio de malpezaj atomkernoj.

Ferenc *Tüdös* (1931—): poli-merkemiisto, elstara reprezentanto de la juna sciencista generacio. Li okupiĝas pri kinetiko kaj mekanismo de polimerigaj reakcioj. Liaj radikokemiaj teorio kaj esploroj pri „bolantaj radikoj” atingis reputacion de fakuloj en la tuta mondo.

Jenő *Varga* (1879—1964): hungardevena soveta ekonomo, estinta popolkomisaro de Hungara Konsilantara Respubliko.

Géza *Zemplén* (1883—1956): organika kemiisto, esploristo de reakcioj de karbohidratoj. Al lia fama skolo apartenis la nuntempaj gvidaj hungaraj organikaj kemiistoj.

Károly *Zipernowsky* (1853—1942): mekanika inĝeniero, unu el la inventintoj de transformatoro.

János *Xantus* (1825—1894): etnografo, natursciencisto, fondinto de la unua meteorologia instituto por esploro de Pacifiko. Hejmenveninte li organizis la Botanikan Ĝardenon kaj la Zoologian Parkon de Budapeŝto.

Kompilis: Árpád MÁTHÉ

Televida intervjuo kun d-ro Albert Szent-Györgyi hungara Nobel premiito

D-ro Albert Szent-Györgyi akademiano, honora membro de la Hungara Scienca Akademio, honora doktoro de la Medicina Universitato de Szeged, la unua hungara Nobel-premiito, en 1973 plenumis sian 80-an jaron. La elstaran biologon oni distingis en 1937 per la medicinscienca Nobel-premio pro la malkovro de la C-vitaminsubstanco. Ekde 1949 li vivas kaj laboras en Usono. Komence de 1974 li vizitis nian patruon kaj ĉi-okaze oni aranĝis kun li televidan intervjuon. Elkaptinte la plej interesajn detalojn el la ampleksa intervjuo, ĉisube ni komunikas tiujn al niaj legantoj.

— Vi studis la spiradon de la ĉeloj. Ĉu el ĝi oni povas tiri ĝeneralajn biologiajn konkludojn, eventuale ekkonon de iaj nesolvitaj vivo-fenomenoj de la besta kaj homa organismo?

— La naturo konstruas laŭ grandaj principoj, ne aplikas apartajn principojn por arbo, floro, besto aŭ homo. Ĉar ekzistas komunaj grandaj principoj, estas egale, kion oni studas, se oni estas sufiĉe inteligenta por kompreni la principojn, la strukturon de la vivo. Tiutempe, komence, mi okupiĝis pri vegetaĵoj, ĉar tio ŝajnis al mi pli simpla; ne estis, sed ŝajnis pli simpla. Baldaŭ mi rimarkis, ke ekzistas du specoj de vegetaĵoj, nome tiaj, kiuj brunigas post kontuziĝo, kaj tiaj, kiuj ne brunigas. Ekzemple, kiel ĉiu scias, se oni faligas pomon, sekvatage aperas bruna makulo tie, kie ĝi kontuziĝis. Tiu brunigo signifas por mi, ke tie okazas ia eksterordinara procezo, kiun oni povas studi. Per mia studado evidentiĝis, ke la brunigo estas defenda reago de la ĉeloj. Nun mi transiris al tiuj vegetaĵoj, kiuj ne brunigas tiaokaze; tiaj estas ekz-e la oranĝo aŭ la citrono. Oni vane faligas ilin aŭ tretas sur ilin, ili neniam brunigos. Mi komencis do studi ĉi tiujn, elmetis ilin al ĥemia provo, kaj jen, mi observis tute etan malfruon de la reakcio; la malfruo estis sekundo aŭ duona sekundo. Tio povis ja ŝajni bagatelo, sed mi dankas miajn rezultojn al tio, ke mi ŝatas la vivon, vivas kun ĝi, kaj ĉiun bagatelan ŝanĝon rimarkitan mi esploras kaj klopodas klarigi. Vidinte tiun malfruon, mi estis certa, ke ia substanco ĝin kaŭzas. Kaj se ĥemiisto supozas ie substanceton, li provas ĝin ankaŭ izoli. Tio estas tre grava, sed kelkfoje tre malfacila, ĉar ĉiuj ĉeloj enhavas cent diversajn substancojn, plejparte en tre eta koncentriteco. Kaj la izolendan substanceton oni devas purigi, elpreni el la ceteraj cent: laboro plurfoje tre longdaŭra kaj malfacila, sed ĝi estas ja la laboro de la ĥemiisto. Nu, kiam mi sukcesis izoli la substanceton, mi trovis ĝin substanco reduktiva; jen kio klarigis la malfruon de la reakcio. Poste klariĝis, ke ĝi estas la C-vitaminsubstanco, la askorbin-acido.

— Ĉu tiuj evidentiĝis, ke la C-vitaminsubstanco kaj la askorbin-acido estas identaj?

— Ne, nur multe pli poste. Nome, la vitaminoj min ne tre interesis, el ia infaneca kaŭzo eble. Mi opiniis, ke ili koncernas propre la kuiristojn, ĉar ili estas substancoj, kiujn oni devas manĝi por ne malsaniĝi. Venis en mian kapon, povas esti, ke ĝi estas ne alia ol la C-vitaminsubstanco. Sed por tion demonstri, mi devus komenci tute aliajn eksperimentojn kun bestoj, kaj je tio mi ne havis emon. Mi simple metis do la substanceton en mian tirkeston. Post kelkaj jaroj tre brava hungara junulo anoncis sin ĉe mi kaj diris, ke lia pasia okupiĝo estas difini, ĉu io estas vitamino aŭ ne. Mi diris al li: jen pulvoro, rigardu ĝin. Li ĝin esploris kaj konstatis, ke ĝi estas C-vitaminsubstanco. Tiam la afero subite fariĝis tre signifa.

— Sed, kiel mi scias, la sorto de la C-vitaminsubstanco ne estis tiel simpla.

— Certe, ne tiel simpla, ĉar nun, havante la substanceton pura, mi devis ĝin analizi ĥemie kaj produkti ĥemie, sed ĝia kvanto estis tro malgranda. Mi transiris en Usonon, ĉar nur tie mi trovis tian materialon, el kiu mi povis produkti la substanceton en kristaloj. Post tutjara laboro mi revenis kun 15 gramoj: grandega rezulto, pri kiu mi tre fieris. Sed hejme ni foruzis tiujn 15 gramojn, ne eksciinte, kio ĝi estis: la esploro do haltis. Mi transigardis multege da vegetaĵoj, sed neniu el ili enhavis la substanceton sufiĉkvante. Tiam mi venis al Szeged. Kiel konate, Szeged estas la centro de la papriko-produktado. Tie mia edzino foje donis al mi kapsikon, paprikofrukton, por vespermanĝo. Mi ne emis ĝin manĝi, nek diri tion mi kuraĝis al ŝi. Tiam venis en mian kapon, ke tiun kreskaĵon mi ankoraŭ ne provis. Mi havis do pretekston: mi diris, ke anstataŭ manĝi, mi portos ĝin en la laboratorion. Kaj ankoraŭ samnokte la kapsiko montrigis vera trezorejo de C-vitaminsubstanco. Post semajno mi havis el ĝi unu kaj duonon da kilogramoj, dum mi povis ĝis tiam produkti nur milongramojn. Mi dividis ĝin disse en la mondo, kaj la eksperimentoj pruvis definitive, kio ĝi estas. Hodiaŭ oni jam fabrikas ĝin po tunoj kaj ĝi fariĝis unu el la grandaj fontoj de sano, grava kaj pripagebla medikamento.

— Do, tiel estiĝis Nobel-premiita malkovro el vespermanĝa preteksto.

— Prefere el edza malkuraĝo.

— Sinjoro profesoro menciis, ke la izolitan pulvoron vi metis en la tirkeston. Tiam okazis ardaĵ diskutoj de scienculoj pri la vitaminoj. Kiel la scienca mondo reagis, kiam pri la pulvoro pruviĝis, ke ĝi estas C-vitamina?

— Malkovro estas malkovro ĝuste tial, ĉar ĝi kontraŭas ĉion ĝis tiam sciatan. Se ne, tiam ĝi estas nur eta aldonajo. Tri malkovrojn mi sukcesis fari en mia vivo, do mi kutimiĝis al tio, ke oni tuj forĵetas ĉion novan kaj diras ĝin erara. La C-vitamina tiam havis tre-tre grandan fakulon en Londono kaj tiu ĉi tuj artikolis, ke li scias tre mal multe pri la C-vitamina, sed kion mi faris, tio estas certe malbona kaj erara. Poste, je mia bedaŭro, oni maldungis lin el lia posteno. Post kelka tempo mi faris ree malkovron, kaj la „standarda” scienco tuj forĵetis ankaŭ tiujn, ĉar ili estis novecaj. Nun mi jam estas tiel, ke se oni forĵetas ion, tiam mi diras: ĝi povas esti tre bona; sed se oni akceptas ion, mi malgajiĝas: ŝajne mi maljuniĝas kaj jam kapablas fari nenion novan.

— Sinjoro profesoro, kio estas ties kaŭzo, ke la vitaminmanko ne same tuŝas la diversajn bestorganismojn?

— Nu, vivo ne ekzistas sen C-vitamina. Sub nia klimato vintre ni ne havas C-vitaminon, ĉar tiam mankas fruktoj. Tial ĉe ni povas vivi nur tiaj bestoj, kiuj mem povas ĝin produkti. Kaj tion povas fari ĉiuj bestoj krom la homo, kobajo kaj simio. Ĉi lastaj tri, nome, devenas de la tropikoj. Ankaŭ la homaro devenas el la tropika Afriko, riĉa je vitaminhavaj fruktoj. Kion ajn la homo tie manĝis, li prenis per ĝi C-vitaminon, tiel fariĝis superflue, ke ĝin produktu la homa organismo. Kion la organismo ne faras, tion ĝi forgesas fari; tiamaniere ni forgesis, kiel fari C-vitaminon.

— Antaŭ nelonge mi legis sciencpopularigan libron, kies enkondukan parton skribis vi. En ĝi fariĝas frazo famiĝinta: „La naturo donas inteligentan respondon al inteligente metitaj demandoj”. Kiel ni komprenu tion?

— Laŭ hungara diro, eĉ en la ĉielo ne ekzistas respondo al stulta demando. Ekz-e, kion la naturo diru, se mi ĝin demandas, kial la fero estas el ligno. Maŝino eble donos ian respondon, sed ĝi estos stulta respondo. Do, la naturo ne povas respondi stultan demandon, aŭ diros ion tian: jen nenio, tenu ĝin firme. La naturo estas pura sistemo, en ĝi estas nur puraj respondoj. Objektivaj respondoj: duoble du estas kvar. Sume: la vero estas en la naturo kaj la eraroj troviĝas en la demandoj malbone metitaj.

— Siatepe, en la Universitato de Szeged, vi estis konata kiel „neregula” profesoro kaj „neregula” esploristo. Kion vi opinias, kian karakteron do havu la universitata instruo, por ke ĝi konformiĝu al la postuloj de la epoko?

— Jam ekde mia lerneja aĝo mi spertas, ke la afero de la instruado tutmonde suferas je grava

eraro. Oni kredas, ke la libro servas por tio, ke ĝian enhavon oni premu en la kapon. Miaopinie, la kapo servas por pensado, kaj la libro por tio, ke oni ne devu konservi ĉion en la kapo. Pli simple estas gardi tion en biblioteko. Pleniginte sian kapon per superfluaĵoj, t.e. per ĉiaspecaj informeroj, oni povas ĝin uzi por nenio. Mi legis libron, kiu donas al junuloj tre patravoĉe konsilojn, kiel ili devas sin prepari por esplorista profesio. Laŭ ĝi: „unue fermu vin en bibliotekon por kvar monatoj”. Nu, neniam mi aŭdis pli grandan stultaĵon! Se tiu komencanto elvenos vive post kvar monatoj el la biblioteko, poste li taŭgos jam por nenio! Miaopinie, la cerbo estas destinita por pensado! Kaj oni devas ne nur pensadi sed ankaŭ vidi, ĝui la grandiozaĵojn de la spirita vivo, ankaŭ la ĝojon. Oni devas travivi la sciencojn. Mi vivas kun miaj eksperimentoj.

Ankaŭ Shakespeare-on oni devas ne ellerni, sed travivi. Tiel same la muzikon. Ĉion travivi, tute absorbiĝi — jen kiel oni devas ŝati la sciencojn. Oni abomeniĝis al mi en la mezlernejo la literaturon kaj ĉion alian, plenigante mian kapon per ĉiaspecaj informeroj, sed ne instruante tion, kiel vidi la belon en la literaturo kaj spiritaj kreaĵoj. Per tio oni paralizas la homan menson kaj terure ĝin malutilas. Tiu multa superfluaĵo, premita en la kapon de la studentoj, poste forvaporigigas senreste, tute forgesite. Kio restos, tio estas la ŝato de la scienco aŭ arto aŭ belo, la sopiro solvi problemojn, la agemo. Kaj jen kio estas grava! Kiam mi estis rektoro en Szeged, nur dum kurta jaro, tiam mi ankaŭ provis ŝanĝi la metodon de la instruado, sed ne multe mi sukcesis, ĉar kontraŭ la malnova enradikiĝinta pensado estis tro malfacile fari subitan ŝanĝon.

— La ĉefa tasko de la esplorist-eduko do estas unuavice: krei la emon por malkovro.

— Oni devas vekti spiritan malsaton, kiu poste restos por la tuta vivo. Ĉar, fininte la universitatan studon, poste ĉion oni forgesos, ĉu ne? Kio restos, tio estas la spirita malsato. Mi mem klopodis ekkoni la tutan biologion kaj tial ofte ŝanĝis direkton: mi ekiris el la anatomio kaj alvenis al la ondoteĥniko. Ĉe tiaj direktoŝanĝoj, komence, mi ne prenis libron en la manon, sed eniris la laboratorion. Elpensinte ian tute stultan teorion, mi komencis ĝin pruvi aŭ refuti. Kiam mi jam konis la materialon, tiam mi eniris la bibliotekon. Tiam la biblioteko jam estis interesa, ĉar mi sciis, kien enmeti la informerojn. Grandaj truoj troviĝis en mia scio, tiujn mi ŝtopis en la biblioteko. Sed se oni sendus min unue tien, tiam mi ne revenus de tie vive aŭ neniam reirus tien.

— Ĉu vi rigardas Hungarion lando honoranta la sciencojn?

— Jes. Honoro al la scienco estas trovebla ĉi tie ankaŭ en la simplaj homoj. Neniam mi forgesos tion, kiam mi foje turniĝis neregule kun mia aŭto antaŭ la Gaja Teatro. Policano min haltigis kaj koleris, ĉar la policanoj koleras tiaokaze, kaj volis noti mian nomon. Kiam mi diris ĝin, li demandis: „Ĉu vi estas tiu Nobel-premiito?” Mi jesis. Tiam

li salutis min soldate, haltigis la tutan trafikon, por ke mi povu trankvile reveni sur la ŝoseon. Tiu simpla hungara vilaĝa knabo tiel honoris la scienccon, ke pro scienculo li haltigis la trafikon. Ĉi tion mi volis ĝui denove ĉi-hejme, ĉar nun mi vivas en granda lando, kie la scienccon oni rigardas ia komerca entrepreno. Tie scienculo ne havas tian reputacion, tie li estas nur unu el la ordinaraĵoj homoj.

— *Ĉu la biologio, bioĥemio povas viaopinie fariĝi mondnivela esplor-tereno en Hungario aŭ por tio estas kapablaj nur tute grandaj kaj riĉaj nacioj?*

— Unue, en la spirita mondo ne ekzistas grandaj nacioj kaj etaj nacioj. Ĉiu lando estas tiom granda, per kiom ĝi kontribuas al la progreso, tute sendepende de ĝia areo. La monfaktoro ŝajnas tre grava en la sciencaj esploroj, tamen la unua kondiĉo estas la talento. Sen talento nenion eblas krei, sed kun talento, ĉe neniam aŭ malmulte da mono, tamen oni povas krei ion. Mi mem, plejparte, laboris per apenaŭ pli ol per reagilo kaj kelkaj solvaĵoj. Estas ja vere, ke la scienco pli kaj pli dependos de tre komplikaj kaj samtempe multekostaj instrumentoj. Sed se la kostojn de tiuj ni komparas al aliaj elspezoj, evidentiĝas, ke proporcie tiuj estas sensignifaj. Antaŭ nelonge mi elkalkulis, kiom ĝis nun la homaro elspezis sume — komence de Adamo kaj Eva — por bazaj esploroj, sen kiuj, kaj sen kies devenaĵoj ni restus ĝis nun nudaj en arbaro aŭ groto. Ĝi elspezis por tiuj la kvinonon de

tio, kiom dum unu jaro por armado. Koncerne Usonon, miakalkule oni elspezis por bazaj esploroj dekomence ĝis nun la duonon de la unujara armeokostoj; sed fama Usona fizikisto-matematikisto kontrolis mian kalkulon kaj trovis ĝin erara, ĉar liakalkule ne la duonon, sed nur la trionon de la jara armado-kostoj oni elspezis por bazaj esploroj. La tuta homaro elspezas jare 220 miliardojn da dolaroj por armado. La tuta ĝisnuna baza esplorado ekde Adamo ne kostis eĉ la kvinonon de tiu sumo.

— *Kiel vi vidas la eblojn en Hungario por la mondnivela daŭrigo de la bioĥemiaj esploroj?*

— Mi havas pri tio grandan esperon, ĉar, kiel mi diris, ties unua kondiĉo estas ekzisto de spiritoj elstaraj, kaj tiaj troviĝas abunde ĉi tie. Kial, tio estas alia demando, eble la miksiĝo de gentoj estigas tiom da eksterordinaraj individuoj. La dua kondiĉo estas, ke la socio aprecu la esplorajn klopodojn; ekzistas ankaŭ ĉi tiu kondiĉo. La tria, la mono — nu, la esploroj postulas ankaŭ monon, sed relative tiel malmultan kompare al aliaj elspezoj, ke multe pli grave estas: kiom oni subtenas la scienccon. Ekzistas ja instrumentoj, ekipaĵoj multekostegaj, kiel ekz-e la t.n. ciklotronoj, grandegaj akceliloj; malgranda lando ne povas tiajn akiri. Sed la biologio povas ekzisti sen tiaj: ĝi haltas ĉe la molekulo aŭ elektrono, do biologiajn esplorojn ankaŭ malgranda lando povas al si permesi, se ĝi havas por tio koron, kaj koro vere ekzistas ĉi tie.

Tr. István LÁSZLÓ



MODERNECO
MAKSIMUMA KOMFORTO
MODERA PREZO
Meblofabriko
KANIZSA

Moderna produktado—moderna produktaĵo!
Loĝoĉambroj Kanizsa-IV, Piccolo, Karina-I, Karina-II, Kékes, Kupido, Kata, Korona, Titusz, —junulara ĉambro Tavasza kaj infanĉambro Kari.

Tapetitaj garnituroj Kedvenc, Rio, Tirol, Piccolo, Titusz, Andrea unupersonaj kaj Kanizsa dupersonaj sofoj, kuŝejoj.

Petu tiujn produktaĵojn—niaj produktoj estas aĉeteblaj en la tuta lando!

Adreso: KANIZSA BÚTORGYÁR (Meblofabriko Kanizsa) 8801 Nagykanizsa, Szemere u. 4. Pf.: 55

Muzikscienco en Hungario

Se oni parolas pri muzikscienco, oni ofte opinias, ke ĉi tiu branĉo de sciencoj interesas sole la fakulojn, la sciencistojn.

Ĉi tiu opinio estas erara. Esti informata pri la diversaj terenoj de la hodiaŭa kultura vivo, apartenas al la inteligenteco de la moderna homo. Kaj la muzika kulturo apartenas en nia epoko al la gravaj partoj de la ŝtata vivo. Ĉi tion pruvas, ke ne nur la socialismaj landoj, sed laŭ ilia ekzemplo ankaŭ la kapitalismaj ŝtatoj dediĉas konstante pli-grandigantajn sumojn de sia buĝeto al la apogo de la muzikkulturo.

La artoj, sed antaŭ ĉio la muzikarto levas la kulturon de la homa sento. Kaj en nia tempo, kiam la homamasoj kaj la individuoj povas ĉiam pli intense agadi por paco kaj homeca vivo — la kulturo de la sentoj, kiu strikte influas la etikan kulturon, ludas pli gravan rolon en la vivo de la socio ol iam ajn.

La hungaraj muziksciencistoj aldonis multon al la evoluigo de la muzikologio, esplorante la historion kaj aliajn problemojn de la hungara muzikkulturo.

Ni volas nun priskribi kelkajn interesajn karakterecojn de la agado de kelkaj el ili.

La hungara muzikscienco fariĝis mondfama en la jaro 1925, kiam la epokfara muziksciencia verko de Béla Bartók: „La hungara popolkanto” aperis en germana lingvo. La mondo eksciis, ke Béla Bartók estas ne nur eminenta komponisto kaj elstara pianisto, sed samtempe grava muzikologo. La verko estis resumo de multaj antaŭaj laboroj, kolektado kaj esplorado de la popolmuziko de la hungaroj. El siaj sciencaj laboroj Bartók ekkonis, ke por studi la hungaran popolmuzikon, estas necese okupi sin pri la popolmuziko de la najbaraj popoloj (rumanoj, slovakoj ktp.). Rezulto de ĉi tiu ekkono estas inter aliaj la grava libro: „Nia popolmuziko kaj la popolmuziko de la najbaraj popoloj”.

La metodo kaj sistemo de la sciencaj esploradoj de Bartók faris vere epokon kaj estis grava faktoro de la hodiaŭa mondfamo de la hungara muzikologio.

Al ĉi tiuj sciencaj laboroj kroĉiĝis la libroj kaj esploradoj de la kunbatalanto de Béla Bartók — Zoltán Kodály. Jam lia filologia doktora disertacio temis pri la strofostrukturo de la hungara popolkanto. En la jaro 1937, do 13 jarojn post la apero de la granda verko de Bartók, aperis lia sistema scienca verko: „La hungara popolmuziko”, kun multaj novaj rezultoj. Béla Bartók kaj Zoltán Kodály kune ellaboris planon de eldono de la hungaraj popolmuzikaj melodioj. Ĉi tiu plano realiĝis nur post la dua mondmilito. La socialisma ŝtato Hungario dediĉas grandan sumon por la scienca eldo-

no de la hungara popolmuzika kulturo. Ĝis nun multaj miloj da melodioj aperis kaj la presado de novaj eldonoj ankoraŭ ne finiĝis.

Krom ĉi tiuj du klasikuloj de la nuntempa hungara muzikkulturo, multaj ceteraj hungaraj komponistoj kaj sciencistoj mobilizis sian forton, dediĉis multe da laboro kaj tempo por evoluigi la hungaran popolmuziko-sciencon. Inter ili ni mencias antaŭ ĉiuj László Lajtha, altnivelan komponiston, personan konaton kaj kunlaboranton de Bartók, kiu post la liberiĝo kun ŝtata subteno publikigis multajn hungarajn popolmelodiojn, inter ili precipe muzikinstrumentajn. — Benjámín Rajeczky estas redaktoro de tre grava serio de fonodiskoj pri la hungara popolmuziko en la kadroj de la laboro de UNESKO. Inter liaj multaj sciencaj verkoj estas menciinda grava kolekto de mezepokaj katolikaj himnoj kaj sekvencoj troveblaj en hungaraj kodeksoj. Lajos Vargyas estas eminenta muzikfolkloristo; li redaktis la muziknotajn ekzemplojn de la menciita granda verko de Kodály.

Ne nur la muzikfolkloraj esploroj de la hungaraj muzikologoj estas indaj je mencio. Gravaj muziksciencaj verkoj pri aliaj branĉoj de la muzikologio aperis ne nur hungarlingve, sed en multaj lingvoj en la tuta mondo.

Eminentaj hungaraj muziksciencistoj de la nuna jarcento estis Ottó Gombosi. Li vivis kaj laboris post 1939 en Usono. Li okupis sin precipe pri la muziko de la mezepoko kaj de la renesanco. Ege valora estas lia esplorado pri la vivo kaj verkaro de la mondfama hungara liutoartisto Bálint Bakfark (1507—1576) kies verkojn li eldonis.

La plej signifa hungara muziksciencisto de nia jarcento post Bartók kaj Kodály estis certe Bence Szabolcsi. Li mortis en 1973 kaj tiam ankaŭ nia revuo memoris pri liaj fundamentaj meritoj koncerne la formadon de la hungara scienca muzikkulturo (Hungara Vivo 1973/2.).

Liaj sciencaj verkoj etendiĝas al diversaj branĉoj de la muzikscienco de la muzikhistorio ĝis la muzikestetiko kaj ĝenerala sintakso de la melodi-formado ktp.

Szabolcsi esploris multajn ĝis lia tempo ne konatajn ĉapitrojn de la hungara muzikhistorio. Lia heredaĵo konsistas el multaj demandoj kaj problemoj, kies solvo atendas sciencistojn, grandparte studentajn sub lia gvidado.

Daŭrigi la laboron de la antaŭuloj — ĉi tio donas perspektivojn por la estonta scienca agado de la hungaraj muziksciencistoj, je bono de la humanisma mondkulturo.

d-ro Lajos LESZNAI

Mezepokaj arttrezoroj en la tero

Tombejo de 600-jaraj
gotikaj statuoj en la Burgmonto

Gastoj unuafoje vizitantaj la ĉefurbon de nia lando, tute certe elektas kiel nepre plenumindan programeron: supreniri la Burgmonton por ĝui belegan panoramon pri Budapeŝto, krome, promenadi en malnova kvartalo de historia etoso. Tiu ĉi monto situanta ĉe la dekstra bordo de Danubo ja estas tre malnova loĝloko. La sudan supron ornamis jam meze de la XIIIa jarcento reĝa palaco, sur la norda parto situis la domoj de la nobeloj kaj burĝa loĝantaro.

La urbo Buda dum sia longa historio travivis multajn sangoplenajn militojn, longan turkan subpremon (1541—1686). Ne mirinde do, ke restis por ni relative malmulte eĉ el la temporezistaj ŝtonmemoraroj de la sinsekvaj stilperiodoj de gotiko, renesanco kaj baroko.

Tiom pli grandan surprizon ve-

La unua — improviza — ekspozicio por ĵurnalistoj



*Kapo de la iama
kavaliro*

kis la sensacia sciigo, ke oni trovis ĉi-jare en la tero de Burgmonto, en la sama loko, grandan amason da gotikaj statuoj, kies artistaj kvalito egalrangas tiun de la tima Eŭropa kortega skulptarto de plej alta nivelo. La arkeologiaj esplorfosadoj ankoraŭ daŭras, sed jam ĝis nun oni trovis diversajn partojn (kapoj, trunkoj, membroj) de pli ol 20 kompletaj statuoj, kaj la malkovranto-gvidarkeologo d-ro László ZOLNAY esperas trovi eĉ pli da ili.

Tiu tre ekscita arkeologia evento tuj elvokis kelkajn demandojn: de kie devenas tiuj statuoj, respektive, ĉu ili estis skulptitaj enaŭ eksterlande, plue, kiam kaj kial estis ĵetitaj tiuj mezepokaj majstraĵoj kvazaŭ en amastombejon?

Antaŭ la plena plenumo de la arkeologiaj laboroj kaj arthistoriista taksado nature ne eblas atendi definitivajn respondojn, tamen por kontentigi iome la scivolemon, ni aŭdu sciigon pri kelkaj indikoj tiurilataj.

Jam de multaj jaroj esploras niaj arkeologoj la subajn tavolojn de la montsupro por ricevi pli precizan bildon pri la historia evoluo de la mezepoka urbo Buda. Tiel okazis, ke sur la loko de la malkonstruita iama reĝa ĉevalstalo, grave difektita en la lasta mondmilito, oni vastamplekse malkovris la nuntempan tersurfacon, kaj trovis en 5-metra profundo



grandan parton de la norda fortikajmuro konstruigita de reĝo Sigmundo (1387—1437). Interne, apud la muro troviĝis fundamentŝtonoj de du civilaj domoj, en kies keloj ripozis ne embarasate dum jarcentoj, se tiel diri, tuta panteono de gotikaj statuoj.

Laŭ geologo-fakspertulo la statuoj estis skulptitaj el Hungarlanda kalkŝtono. Ili ne estis do importitaj, sed enlande pretigitaj. La cirkonstancoj (trovloko, arta kvalito) supozigas, ke tiuj majstroverkoj estis kreataj en la skulptmetiejo de la antaŭa reĝo Ludoviko la Granda (1326—1382) el la dinastio Anjou kaj laŭ ekstera aspekto, la statuoj jam staris diversloke, do, sur ilia nuna trovloko ne estis ia skulptmetiejo. Je unua ekvido la statuoj figuras praulojn, heroojn, ekleziajn kaj laikajn grandulojn, sed nun ankoraŭ anonimajn. Koncerne la sorton de la statuoj, ŝajnas tre probabla, ke ili estis lokitaj en la kelojn laŭ supera ordono, kiam Sigmundo, pligrandigante la reĝan palacon, malkonstruigis la reĝan kapelon kaj partojn de la tiutempa Anjou-palaco, kaj dekoraciis ilin per novaj artobjektoj.

Kun streĉa atento ni atendas freŝajn rezultojn, sed jam nun ni povas kvalifiki la gotikan galerion nacia trezor-trovaĵo, kiu malfermis novan ĉapitron en la hungara arthistorio.

J. MATÉFFY

panoramo

Al niaj legantoj kaj ĉiu esperantistoj ni deziras agrablan kristnaskon kaj feliĉan novan jaron.

Hungara Vivo

*

En la apud-Balatona urbo Keszthely okazis en aŭgusto la II. Europa Kristalografia Konferenco. Pasintjare la konferenco estis tenata en Bordeaux, en Franclando; tie 750 fakuloj el 21 landoj okupiĝis sur molekula nivelo pri la korelativa efiko de la kristalaj substancoj kaj pri la preciza determino de la elektrona koncentriteco. La ĉijaran konferencon jam partoprenis pli ol mil personoj el 29 landoj. La scienca programo dividiĝis laŭ du ĉeftemoj: aplikado de la difrakta esploro de perturbitaj kristaloj en la scienco kaj en la industrio, kaj meĥanisma sistemigo de ĥemie parencaj kombinaĵoj. Oni anoncis 266 disertaĵojn; tiom prelegi al la tuta aŭskultantaro ne estis eble. Tial oni presis la tekston de ĉiuj kaj disdonis la materialon al ĉiuj partoprenantoj. Tiamaniere formiĝis diskut-kunsideoj, rondtablaj interparoladoj kaj personaj renkontiĝoj, en kiuj la fakuloj intertraktis la disertaĵojn skribe jam konatajn al ili. Ok apartajn tradiciajn prelegojn faris invititaj famaj fakprofesoroj por la tuta aŭskultantaro. Ekspozicio estis aranĝita el la plej novaj instrumentoj ligitaj al la pritraktataj temoj; ankaŭ dek eksterlandaj firmoj ekspoziciis tie.

*

Ĉu vi ankoraŭ ne vizitis la 2000-jaran urbon Pécs? Ĉu vi ankoraŭ ne ĝuis la amikan esperantistan etoson de IREN en Abaliget? Ne povas esti!!!

Nepre aliĝu al la *Internacia Renkontiĝo Naturamika* — riĉa programo — favoraj kotizoj — rabatoj *Organiza Komitato, H-7601 Pécs 1, Pf. 2. Hungario.*

Nova kuraca hotelo en Keszthely



Altaro de Isis en Szombathely

En la Transdanuba (Panonia) urbo Szombathely, kiu estas konstruita sur la loko de la iama romia-provinca urbo Savaria, staras Isis-sanktejo; ĝi estas rekonstruita el la elfositaj restaĵoj de 2000-jara „Iseum”. Tiu Isis-sanktejo estas uzata ĉiujare kiel scenejo de teatraj ludoj. Plejofte tie ludata estas la opero de Mozart: „La Magia Fluto”, ĉar ĝia temo havas ion komunan kun la antikva, Egipto-devena Isis-kulto. Ankaŭ ĉi-jare oni prezentis la operon kun granda sukceso. Sarastro estis kantata de Kolos Kováts, la reĝinon de la punkto kantis Isabelle Nawwe. Kunlaboris la simfonia orkestro de Szombathely kaj la kantofioro Savaria.

La Mecsek-montara Administra Komitato decidis evoluigi la vilaĝon Orfű je granda centro de ekskursantoj kaj ripozantoj. Orfű situas en arbaro, proksime al la granda urbo Pécs kaj apud du lagoj termoakvaj. Oni planas tie grandan ripozejon kaj turistejon: la centra tereno havos lignodomojn por 5000 turistoj, tendarejon kaj aŭtoparkejon ĉefe por semajnfinaj ekskursantoj, sume por 20 mil personoj. Oni jam komencis ankaŭ la konstruon de moderna hotelo kun 100 litoj, kun restoracio kaj vendejoj. Post kelkaj jaroj, laŭ la programo, estos sufiĉaj tranoktejoj, vendejoj, bufedoj, belaj parkoj, bonaj asphalt-vojoj, sportejo, kinejo, eblo de akvosportoj.

panoramo



La fama ponto de Hortobágy

En la urbo Csongrád, ĉefurbo de departemento Csongrád, oni fondis Kubikistan Muzeon. La „kubikistoj” estis grundlaboristoj, kiuj fosis kaj transportadis la teron ĉe konstruo de fervojoj, digo ktp.; sian nomon ili ricevis de tio, ke ili estis pagataj po kub-metro de la transportita terokvanto. Efektive, ili laboris kiel la konstruantoj de la egiptaj piramidoj: iliaj iloj estis nur fosilo, ŝovelilo kaj puŝĉareto, ilia laborigo estis ekstrema ekspluato de la fizika forto de homo. Nialande, en la pasinta jarcento, la kubikistoj konstruis 58 mil kilometrojn longan landvojon, 17 mil kilometrojn longan fervoj-linion, krome ili faris kontraŭinundan laboron por ses milionoj da hektaroj da plugkampoj: konstruis el tero 7000 kilometrojn longan digon sur la bordoj de riveroj, elterigis 1616 kilometrojn longan novan fluejon por riveroj. Tiutempe la plej malriĉaj, plejparte senteraj homoj de la lando vivis en la departemento Csongrád, tial estis tie la centro de la repletigo de laborfortoj (kaj ankaŭ la nesto de kampula revolucio, nomata pro tio: „tempest-angulo”). En la fondita muzeo oni povas vidi la laboron, vivon, klopodojn, batalojn kaj ilojn de tiuj „kubikistoj”. Oni jam apenaŭ vidas plu tiun specon de terlaboristoj: anstataŭ ili laboras la diversaj maŝinoj. Ili kaj iliaj idoj eniris en agrar-kooperativojn, aŭ en la industrion. La tre malmultaj, kiuj ankoraŭ restis, laboras ĉe arkeologiaj esplor-fosadoj.

Ci-somere komencis grandan laboron la Budapeŝta Historia Muzeo: fotistoj, desegnistoj, geodistoj, studentoj kaj grundlaboristoj faras arkeologian esplorfosadon en la urboparto Buda, pli precize en Óbuda (Old-Buda), kie nun konstruiĝas nova, moderna loĝkvartalo. Tie oni jam trovis multajn memoraĵojn el la Romia kaj mezepoka tempoj. Interalie oni elfosis grandan domon el la 2-a jarcento, oleo-premilon, parton de klostro Klarana. Nun oni elterigadas la legiendaron en Aquincum kaj mezepokajn klostrojn franciskanajn kaj kapucenan, la ruinojn de la iama reĝina fortikaĵo. Ofte okazas, ke pro la grandvalora historiaj monumentoj oni devas aliformi la planojn de la konstruotaj domblokoj.

En H. V. (1974/5) ni jam menciis, ke la Landa Naturprotektita Konsilio aprobis la estigon de Nacia Parko en la regiono Kiskunság. Nun ree ni povas raporti pri simila grava iniciato: pretiĝis tiu nova pavilono apud la centro de Landa Naturprotektita Oficejo en Budapeŝto, kie oni malfermos la unuan naturprotektan muzeon de la lando. La vizitantoj povos tie rigardi diafilmojn pri la protektataj bestoj, vegetaĵoj kaj teritorioj, inter aliaj estos videblaj tiuj 25 bird-specioj, kiujn oni povas ĉasi konstante aŭ intermite. La konstruaĵo havas prelegejon por diversaj sciencaj societoj: Hung. Ornitologia Societo, Naturamika Ligo, Sciencopopulariga Societo ktp. Ĉirkaŭ la muzeo estos parko, kie oni jam enradikigis tiujn pravegetaĵojn, kiuj estas troveblaj jam nur en kelkaj regionoj de la lando. La eniro estos senpaga.

Konataj lokoj en la stepo (pusto) de Hortobágy estas la ĉardo, la Paŝtista Muzeo kaj en ilia proksimo la Naŭtrua Ponto, kiu kun naŭ arkoj transportas la riveron Hortobágy. Tie oni aranĝis en aŭgusto la tradicion tritagan Pontan Foiro, kie en multaj tendoj kaj pavilonoj oni povis aĉeti diversajn popularajn varojn kaj memoraĵojn (suveniurojn). En alia parto de la foiro, metiistoj vendadis mil specojn de uz-objektoj, ekde lignokulero ĝis lignokuvo, ekde najlo ĝis ĉara ŝtalakso. Ankaŭ la amuza programo estis riĉa: buntvestaj popoldancistoj, ĉevalistoj, cigan-muziko, blovorkestroj. Prezente oni preterpelis grizan bovaron, gregon de speciale hungaraj „racka”-ŝafoj. Bovo rostigiĝis sur grandegaj rostostangoj super ligno-ardaĵo. Al la en-kaj eksterlandaj gastoj la multaj vidindaĵoj certe restos longtempe en la memoro.

Post la granda sukceso de la Ponta Foiro en la Nacia Parko de Hortobágy oni komencis konstrui novan rotondon, en kiu oni ekspozicias la estaĵojn vivantajn en la granda stepo. Sur nigraj-blankaj kaj koloraj fotoj oni prezentos la riĉajn faŭnon kaj flaŭron de Hortobágy. En aparta ejo de la rotondo oni projekcias kolorajn diafilmojn kaj aŭdigos per son-bendoj la voĉon de la stepaj birdoj. Tiamaniere la vizitantoj povos ekoni ankaŭ la maloftajn kaj tial severe defendatajn estaĵojn, vivantajn sur tiu tereno, kien la eniro, ĝuste por ŝirmado, estas malpermesita. En la rotondo kaj en la apuda Paŝtista Muzeo troviĝos diversaj folkloraj aĵoj kaj ankaŭ libroj pri Hortobágy, aĉeteblaj.

Mondkongreso de Ekonomiistoj okazis en aŭgusto en Budapeŝto; al la granda internacia renkontiĝo alvenis el 60 landoj pli ol 1500 eksterlandaj fakuloj: akademi-anoj, univ. profesoroj, ekonomiistoj, bankistoj, komercistoj, planistoj. El la kvin kontinentoj, kaj la orientaj kaj la okcidentaj kaj la evoluantaj landoj estis reprezentitaj. En la 1968-jara mondkongreso, en Montreal, la centra temo estis la futuro de la mondmerkato kaj komerco, nun oni diskutis pri la internacia labordivido, pri la internacia kunlaborado kaj pri la daŭraj produkto-interrilatoj. La 12-membra programkomitato estis prezidita de la Usona profesoro Fritz Machlup, prezidanto de la Internacia Ekonomia Asocio. La komitato difinis la temojn diskutendajn en la dek sekcioj de la mondkongreso. 200 hungaraj fakuloj helpis al la Hungara Ekonomia Asocio aranĝi la gravan internacian kunvenon.

Komp. kaj tr. Szilárd BÁLINT

Tibor Déry, grandulo de la hungara moderna literaturo, ĉi-jare fariĝis 80-jara; je tiu okazo liaj verkoj aperas en nova eldono. Ido de riĉaj burĝoj, li aniĝis en 1919 al la komunista partio kaj estis membro de la Verkista Direktorio; tial li devis poste fuĝi eksterlanden kaj hejmenvenis nur post 1933. Tiam li komencis verki la trivoluman „Nefinita frazo”, en kiu li rakontas la vojon de grandburĝido en la laboristan movadon kaj kompartion. Lia romano „Respondo” priskribas la antaŭmilitan hungaran socion tra evoluo de laboristido kaj tra sorto de univ. profesoro. Liaj noveloj verkitaĵoj en 1955—56 (Amo, Niki) pripentras malhomecon en la person-kultaj tempoj. Post 1956, pro sia agado dum la kontraŭevolucio, li estis kondamnita, sed en 1961 oni nuligis la kondamnon kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj. Ĝis nun li verkas; precipe grandsukcesaj estas lia imagita raporto pri Usona Pop-festivalo (ankaŭ surscenigita) kaj lia romaneto „Kara boopeer”, rakontanta la lastan kontraŭvolan kaj senesperan amsenton de maljuna bopatro al sia bofilino. La prezentita peco estas unu el la du noveloj, kiuj servis kiel libreto de grandsukcesa filmo.

La pordo de la ĉelo malfermiĝis kaj la provoso enĵetis ion.

— Prenu! — li diris.

Ĝi estis sako, kun numero. Ĝi falis surteren, ĝuste antaŭ la piedojn de la malliberulo. B. stariĝis, prenis profundan spiron kaj alrigardis la provoson. — Via civila vesto! — diris tiu. Transvestu vin. Oni tuj vin razos.

Lia vesto demetita antaŭ ses jaroj estis en la sako, kaj liaj ŝuoj. La vesto estis tiel ĉifita, ke ne restis sur ĝi eĉ manplaton granda glata loko; la ŝuoj estis ŝimaj. Li disfaldis la ĉemizon; ankaŭ tiu ĉi estis ŝima. Kiam li pretiĝis pri la vestado, jam venis la mallibera barbiro kaj lin razis.

Post unu horo oni venigis lin antaŭ la malgrandan prizonkontoron. Sur la koridoro jam ok ĝis dek malliberuloj, sin revestintaj en civilkostumon, atendadis, tamen lin oni envokis la unua, tuj kiam li alvenis antaŭ la pordon de la kontoro. Ĉe la skribotablo sidis serĝento, apud li alia, antaŭ ili kaptano paŝadis tien-reen en la strikta ejo.

— Venu ĉi tien! — diris la serĝento sidanta ĉe la tablo. — Via nomo? ... La nomo de via patrio? ... Kien vi iros de ĉi tie?

— Mi ne scias — diris B.

— Kiel do? — demandis la serĝento. — Ĉu vi ne scias, kien vi venos?

— Ne — diris B. — Mi ne scias, kien oni min venigos.

La serĝento alrigardis lin mishumore. — Nenien oni vin venigos — li diris moroze. — Vi povas hejmeniri por tagmanĝi al via edzino. Nokte vi jam povas uzi ankaŭ vian ilon. Ĉu komprenite?

La malliberulo ne respondis.

— Do, kien vi foriros?

— Szilfa-strato 17.

— Budapeŝto, kioma distrikto?

— Dua — diris B. — Kial oni min ellasas?

— Kial vi tiom demandadas? — murmuris la serĝento. — Oni vin ellasas. Ĝoju, ke vi liberiĝos de ni.

El la najbara ĉambro oni elportis liajn valorojn: nikelan brakhorloĝon, fontoplumon kaj trivitan, verdete-nigran monujon, kiun ankoraŭ de sia patro li heredis. La monujo estis malplena.

— Subskribu ĉi tion! — diris la serĝento. Ĝi estis kvitanco pri la nikela horloĝo, fontoplumo kaj monujo.

— Ankaŭ ĉi tion!

Ankaŭ tiu estis kvitanco: pri laborsalajro de cent kvardek ses forintoj. La monon oni kalkulis antaŭ li sur la tablon. — Transprenu ĝin! — diris la serĝento. B. ree prenis el sia poŝo la monujon, kaj la banknotojn kune kun la moneroj li enpemis en ties unu fakon. Ankaŭ la monujo estis ŝimodora. Kiel lastan, oni donis al li la liberigan dokumenton. La punktita linio kun la komenco „kaŭzo de aresto” estis malplena.

Sur la koridoro li pasumis proksimume unu horon, poste lin kun tri aliaj oni kondukis al la ĉefpordo de la prizono. Sed antaŭ ol ili atingis la pordon, postkurinta serĝento ilin haltigis. Unu homon li elprenis el la kvaropo kaj rekondukigis lin inter du maŝinpistolaj gardistoj en la prizon-konstruaĵon. La freŝe razita vizaĝo de tiu homo subite flaviĝis, kvazaŭ li estus trafita de gal-alfluo, liaj okuloj gelatiniĝis.

Ili trio iris plu ĝis la pordego.

— Jen la tramo, ascendu! — diris la gardisto al B., ekzameninte kaj redoninte la liberig-dokumenton.

B. staris kaj rigardis antaŭ sin sur la teron.

— Je kio vi atendas? — demandis la serĝento.

B. staris plue, rigardis la teron.

— Iru jam en la inferon! — diris la gardisto. — Je kio vi atendas?

— Mi iras — diris B. — Sekve, mi povas iri?

La gardisto ne respondis. B. enpoŝigis la liberig-dokumenton kaj eliris tra la pordego. Post kelkaj paŝoj li volis retrorigardi, sed li regis sin kaj pluiris. Li atentis, sed ne aŭdis post si paŝojn. Li pensis, ke se li atingos la tramon sen tio, ke mano pezigus deposte sur lia ŝultro aŭ oni vokus lin deposte per lia nomo, tiam supozeble oni delasis lin definitive. Ĉu definitive?

Kiam li atingis la tramhaltejon, li subite returniĝis: neniu venis post li. Li ŝovis la manon en la pantalon-poŝon, sed li ne havis poŝtukon, per kiu li povus deviŝi la ŝviton eligintan sur lia frunto. Li ascendis tramon grincantan ĝuste antaŭ li. De la postveturilo ĝuste tiam descendis provoso kaj, preterpasante antaŭ la unua veturilo, per sia tuta

aspra vizaĝo kaj siaj malgrandaj okuloj, rigardmezuris lin longe kaj defie. B. ne salutis lin. La tramo ekiris.

Tiuminute — ekde tiu momentfrakcio, kiam li ne salutis la provoson kaj la tramo ekiris — tiuminute eksonis ĉirkaŭ li la mondo. Estis tiaspeca sento, kiel se en kinejo la filmo ruliĝas kelkan tempon sensone pro maŝinpaneo, kaj, per unu fojo, meze de iu frazo, de iu vorto, la voĉo revenas en la malplene disfaŭkiĝadantan buŝon de la aktoroj, kaj la surda-muta salono, en kiu ankaŭ la publiko kvazaŭ perdis sian trian dimension, subite, kun milisekunda starto, pleniĝas ĝisplafone per laŭta muziko, kanto, dialogoj. Cie-ĉirkaŭe komencis eksplodi ĉiu koloro. La renkonte-veninta tramo estis tiel flava, kiel flavan li ankoraŭ ne vidis dum sia vivo, kaj tiel rapide pretermuĝis antaŭ krikolora griza unuataĝa domo, ke B. devis supozi, ke oni plu ne povos ĝin haltigi. Sur la transa flanko de la strato du papavet-ruĝaj ĉevaloj galopis antaŭ malplena ŝarĝveturilo, kies enreviga tintado tremigis la feajn cirus-nubojn naĝantajn surĉiele. Vitroverda ĝardeneto ondadis retrodirekte, kun du flamantaj vitrogloboj kaj post si kun aperta kuirejfenestro. Sur la trotuaroj promenis multaj milionoj da homoj, ĉiuj en civila vesto, unu pli bela ol la alia kaj ĉiuj diferencaj reciproke. Inter ili troviĝis multaj de surprize malalta staturato, kelkaj altis nur ĝis la genuoj de la pasantoj, multajn oni devis porti surbrake. Kaj la virinoj!

Ĉar B. sentis, ke liaj okuloj enlarmiĝas, li eniris la tram-internon. La konduktorino havis molsonoran, korflata agrablan voĉon. B. aĉetis la bileton kaj sidiĝis sur unuopa sidloko en angulo de la veturilo. Li enfermiĝis. Li timis, ke restante nefermita, li perdos sian memregon. Kiam foje li elrigardis tra la fenestro, kontraŭflanke sur la trotuaro li ekvidis viron, kiu karesis la vizaĝon de junulino. Ree li ŝovis la manon en la pantalonan poŝon sed ree li ne trovis poŝtukon, per kiu li povus viŝi de la frunto la freŝan ŝviton. Laboristo sidiĝis kontraŭe al li sur la vakantan lokon, kun dek boteloj da biero en sia teko.

La konduktorino ridis.

— Ĉu tio ne estas multa?

— Familihava homo mi estas, kamaradino, — diris la laboristo. — Mia edzino amas rigardi, ke ŝia edzo trinkas.

La konduktorino ridis:

— Ĉu rigardi?

— Nu jes.

— Ĉu bruna biero?

— Jes.

— Pli bona estas la hela.

— Mia edzino amas vidi la brunan — diris la laboristo.

La konduktorino ridis.

— Vi povus lasi ĉi tie por mi unu botelon.

— Ĉu brunan?

— Nu, brunan!

— Por kio?

La konduktorino ridis:

— Mi ĝin hejmenportus al mia edzo.



Dum babilado

— Kial la bruna al li, se li preferas la blondan? — diris la laboristo.

La konduktorino ridis. Ili alvenis haltejon. B. descendis kaj prenis taksion. La ŝoforo defrapis la flageton. — Kien vi deziras? — li demandis post kelka tempo, ĉar lia pasaĝero ne ekparolis.

— Al Buda — diris B.

La ŝoforo retroturniĝis, observe rigardis la pasaĝeron.

— Sur kiu ponto?

B. rigardis antaŭ sin. — Vi demandas, sur kiu ponto?

— Ĉu vi eble ne estas konanto de Budapeŝto? — demandis la ŝoforo.

— Sur la Margareta ponto — diris B.

La aŭto ekiris. B. sidis rekte, ne apogiĝis dorse. Tra la senferma fenestro de la aŭto enfrapiĝis la benzin- kaj polvodoro de la sunluma strato kaj la tintado de la tramoj. Dekstre kaj maldekstre, ambaŭ trotuarojn la suno albrilis egalmaniere; tiom da ombroj kuris sur la asfalto interkruciĝante antaŭ la ŝuoj de la piedpasantoj, ke ili kvazaŭ duobligis la stratan trafikon. Sub orangkolora striita ŝirmo-tolo antaŭ sukeraĵejo, junulino cigaredis en skarлата lumo. Plue, trotuar-angule, eta juna kaŝtanarbo jam disvolvis siajn frondojn kaj kolektis sub si manplate grandan, lozan, ĉi kaj tien tremantan ombron.

— Se vi vidis tabakvendejon... — diris B. al la ŝoforo.

Post tri domoj ili haltis. B. elrigardis trafenestre: ili staris antaŭ nefermita butikpordo, antaŭ monto

da ruĝaj rafanetoj, monto da laktukoj, monto da ruĝaj Jonatan-pomoj. Iom pli fore, streta pordo de tabakvendejo.

— Bonvolu nur resti sidanta — diris la ŝoforo, turninte sin — mi alportos. Kian vi deziras?

B. rigardis la rafanetojn. Liaj manoj tremis.

— Ĉu Kossuth-cigaredojn?

— Jes — diris B. — Kaj skatolon da alumetoj.

La ŝoforo descendis. — Bonvolu lasi la monon, ni almetos al la veturpago. Ĉu unu skatolon?

— Estu kompleza — diris B.

— Ĉu vi deziras fumi? — demandis la ŝoforo, kiam li revenis. — Ankaŭ mia bofrato sidis post krado du jarojn, ankaŭ lia unua vojo estis al la tabakvendejo. Antaŭe li forfumis du Kossuth-ojn unu post la alia, nur tiam li hejmeniris al sia familio.

— Ĉu tio vidiĝas sur mi? — demandis B. post kelka tempo.

— Nu, eble iom ĝi vidiĝas — diris la ŝoforo. — Ankaŭ mia bofrato havis tiel malsanetan aspekton. Komprenoble, vi povus veni ankaŭ el hospitalo, sed tie oni ne ĉifas la vestojn. Kiel longe vi enestis?

— Ses jarojn — diris B.

La ŝoforo ekfajtis. — Ĉu politika?

— Jes — diris B. — Unu kaj duono da jaroj en la ĉelo de la mortkondamnitaj.

— Kaj oni nun vin ellasis?

— Ŝajne — diris B. — Ĉu tre vidiĝas sur mi la afero?

La ŝoforo levis kaj faligis ambaŭ ŝultrojn. — Ses jaroj! — li ripetis. — Ne mirinde.

B. descendis ĉe la Dentradula Stacio, la restantan vojon li iris piede; li volis sin kutimigi al la libera moviĝado antaŭ ol renkontiĝi kun sia edzino. La ŝoforo ne akceptis trinkmonon. — Vi bezonas la monon, kamarado — li diris. — Por nenio alia elspezu ol por via sano! Ĉiutage viando, duonlitro da bona vino, tiel baldaŭ vi refortiĝos.

— Ĝis revido — diris B.

Kontraŭflanke, iom oblikve, li ekvidis stratan spegulon en montrofenestro de modaĵ-vendejo.

Kelktempe li staradis antaŭ ĝi, poste pluiris. Ĉar sur la Pasaréti-avenuo trafikis multaj homoj, do sur pado, kondukanta apud tenisejo sur montetan flankon, li transiris al la Herman-Otto-avenuo. Sed tie la spaco estis tro multa ĉirkaŭ li kun la neprikonstruitaj grundoj apertaj rekte al la transflankaj montoj. Lia kapo turniĝis, li sidiĝis en la herbo. Lia edzino sen tio ne atendas lin, li do havas tempon de duonhoru sidadi en la herbo. Transe, post heĝo, staris floranta pomarbo. B. rigardis ĝin kelktempe, poste li stariĝis kaj iris al la heĝo. La vakslumaj grandaj blankaj floroj sidis sur la branĉoj tiel dense, ke se oni deinfre suprenrigardis en la neĝoblanka arbokronon, post ĝi apenaŭ vidiĝis la malhelblue tremanta ebena de la ĉielo. Se oni rigardis la florojn po unu, tiam plej interne, en la kaliko, ĉe la radiko de la supre rondaj, alinfre stretiĝantaj petaloj, oni sentis sidi rozkoloran spiron, kiu rozkolorigis al ili tenere, aparte al ĉiu, ilian fianĉinan brilon. Tiom da abeloj zumis en la

floroj, po unu eta vibranta orfadeno en la blanka teksaĵo de la petaloj, ke la tuta arbo ŝajnis ondadi kiel vualo suprenjetita en venton. B. staris kaj aŭskultis la konversantan arbon. Li trovis du branĉojn, inter kiuj oni povis elvidi al la ĉielo kaj, ankoraŭ pli disten trans ĝi, al senmove staranta lana nubeto, efektanta kiel alia floranta pomarbo en neatingebla foro super la infra arbo. Tiel longe li rigardis tiujn du, tra la palpebla la nepalpeblan, ĝis li vertiĝis.

Ĉar li forgesis streĉi sian brakhorloĝon kaj ne sciis, kiom da tempo pasis, de kiam li descendis el la taksio, li turnis sin surkalkane kaj ekiris alhejme. Post kelkaj paŝoj li stariĝis malantaŭ arbusto kaj vomis; de tio li malpeziĝis. Post duonhoru da piediro, tra stretaj, sunlumaj flankstratoj, kiuj plensutis la montetan deklivon per florantaj frukt-arboj, li haltis antaŭ domo. Ili loĝis en la unua etaĝo. En la ĝardeno, ambaŭflanke de la pordego, staris po unu siring-arbedo. Li supreniris sur la ŝtuparo.

Li rinkigis, sed oni ne malfermis. Sur la pordo ne estis nom-tabeleto. Li iris infren en la subteran etaĝon, al la pordisto; li frapetis.

— Bonan tagon — li diris al la virino malferminta la pordon. Ankaŭ ŝi dume magriĝis, maljunigis.

— Kiun vi bonvolas serĉi?

— Mi estas B. — diris B. — Ĉu mia edzino ankoraŭ loĝas ĉi tie?

— Diosinjoro! — diris la virino.

B. rigardis la teron. — Ĉu mia edzino ankoraŭ loĝas ĉi tie?

— Diosinjoro — diris la virino refoje. — Ĉu vi hejmenvenis?

— Jes — diris B. — Ĉu mia edzino ankoraŭ loĝas ĉi tie?

La virino delasis la klinkon kaj apogis sin sinke al la fosto. — Ĉu vi hejmenvenis? — ŝi ripetis. — Diosinjoro! Komprenoble, ke ŝi loĝas ĉi tie. Ankaŭ ŝi ne sciis, ke vi venos hejmen? Bona Diosinjoro! Komprenoble, ke ŝi loĝas ĉi tie.

— Ankaŭ mia filo?

La virino komprenis tion. — Sana — ŝi diris. — Li estas sana, nenio malbona al li; brava, bela, granda knabo li fariĝis. Diosinjoro!

B. silentis.

— Bonvolu enveni al ni! — diris la virino kun tremanta voĉo. — Bonvolu enveni! Mi sciis, ke vi estas senkulpa. Mi sciis, ke foje vi venos hejmen.

— Oni ne malfermis la pordon — diris B., kvankam mi rinkigis trifoje.

— Bonvolu enveni al ni! — ripetis la virino. — Neniu estas hejme. Ankaŭ la kunluantoj foriris dehejme.

B. rigardis la teron, silentis.

— Via edzino iradas labori, kaj Geoĉjo ankoraŭ estas en la lernejo — diris la virino. — Ĉu vi ne volus enveni? Posttagmeze ili revenos hejmen.

— Ĉu estas kunluantoj? — demandis B.

— Ili estas tre bonordaj homoj — diris la virino. — Via edzino bone konkordas kun ili. Diosinjoro, ĉu vi do venis hejmen?

B. silentis.

— La loĝeja ŝlosilo estas ĉe mi — diris la virino post tempeto —, bonvolu supreniri kaj ripozi, ĝis via edzino venos hejmen.

Surmure, sur najlo, du ŝlosiloj pendis, la virino deprenis unun kaj tirfermis post si la pordon.

— Bonvolu supreniri kaj ripozi! — ŝi diris.

B. rigardis antaŭ sin sur la teron. — Ĉu ankaŭ vi venos? — li demandis.

— Kompreneble — diris la virino. — Mi montros, en kiu ĉambro loĝas via edzino.

— En kiu ĉambro ŝi loĝas? — demandis B.

— Sciu, bonvole, ke la kunluantoj estas kvarope — diris la virino —, al tiuj oni atribuis la du ĉambrojn. Via edzino kun Geoĉjo transloĝiĝis en la servistinan ĉambrom. Sed la kuirejo kaj la banĉambro restis komunaj.

B. ne respondis.

— Ĉu ni supreniru — demandis la virino —, aŭ prefere ĉe ni vi atendos, ĝis ili hejmenvenos? Bonvolu ĉe ni kuŝiĝi sur la divano kaj tie iom elripozi, ĝis ili hejmenvenos.

— Ĉu la kuirejo kaj la banĉambro estas komunaj? — demandis B.

— Kompreneble, komunaj — diris la virino.

B. levis sian kapon kaj rigardis la virinon alvizaĝe. — Tiam do mi rajtas min bani?

— Nature — diris la virino ridetante kaj per sia manplato ŝi tenere ĉirkaŭfermis la kubuton de B., kvazaŭ ŝi volus lin apogi —, kompreneble, vi rajtas vin bani, kiel do vi ne rajtus? Ĝi estas ankaŭ via loĝejo, kaj, mi diras, la kuirejo kaj la banĉambro estas komunaj. Volonte mi ankaŭ hejtus por vi, ĉar devintre restis ankoraŭ kelka ligno en la kelo, sed laŭ mia scio la kunluantoj ŝlosas portage la banĉambrom.

B. silentis, ree rigardis la teron.

— Ni supreniru, aŭ, ĉu vi volas veni al ni? — demandis la virino. — Bonvolu veni al ni! Mi estas en la kuirejo, mi ne ĝenos vin, vi kuŝiĝos sur la divano, eble vi eĉ povos endormiĝi.

— Dankon — diris B. — Prefere mi suprenirus.

La fenestro de la malgranda servistina ĉambro rigardis norden, kiel tiu de la servistinaĵo ĉambroj ĝenerale; antaŭ ĝi staris ornama frakseno, dekstre vidiĝis la Gugger-monta pinto, nigra de abiaĵoj. La ĉambro estis verdeto malhela pro la frondoj de la frakseno. Tuj kiam li restis sola kaj lia spirado kvietigis, li rekonis la odoron de sia edzino, Li sidigis antaŭ la fenestro kaj spiradis. Li rigardis la frondojn de la frakseno. Kun sia tuta korpo li sidis en la odoro de sia edzino kaj spiradis. En la strikta ĉambreto troviĝis entute unu trivita blanka ŝranko, unu fer-lito, unu tablo, unu seĝo; por ke oni povu aliri la liton, oni devis flankenŝovi la seĝon. Li ne kuŝiĝis sur la lito, li sidis kaj spiradis. La tablo estis alte primitita per ĉiaspecaj aĵoj, per libroj, vestoj, infanludiloj; ankaŭ manspeguleto troviĝis inter ili; li rigardis sin en ĝi; tion saman ĝi montris kiel la spegulo de la montrofenestro ĉe la Dentrado. Kun la spegulplato infren li remetis ĝin sur la tablon. Li ne serĉadis sur la tablo inter la aĵoj de sia edzino. En la cindrujo sidis ruĝ-



Déry verkas en sia ĝardeno [lago la] [ĉe] Balatono

punktita pilko. Ankaŭ super la tablo sentiĝis la odoro de lia edzino.

Apenaŭ li residiĝis apud la fenestron, la pordistino enportis grandan tason da laktokafo kaj du dikajn tranĉaĵojn de laktopano. Li manĝis ilin, restinte sola. Post nelonge, la edzino de la teretaĝa loĝanto rinkigis por eniro, tiel same kun taso da laktokafo, kun butera pano, kolbaso, kun tia sama Jonatan-pomo, kiun li vidis surstrate en la montrofenestro de la legomvendejo. Ŝi demetis la pleton sur la tablon, ŝiaj okuloj estis larmaj, kaj post kelkaj minutoj ŝi foriris. B., restinte sola, manĝis ankaŭ ĉion tion. Ankoraŭ ĝis nun li ne streĉis sian brakhorloĝon, li ne sciis do, de kiam li sidas jam apud la fenestro. La fenestro rigardis al la posta ĝardeno, kie neniu iradis. Inter la helverdaj, blankrandaj folioj de la frakseno foje-foje venteto trafirtis kaj vibrigis la posttagmezan lumon sur la blanke kalkitaj muroj de la servistina ĉambro.

Kiam li sin plensuĉis jam per la odoro de sia edzino kaj jam ne sentis ĝin plu, li infreniris al la strato antaŭ la ĝardenpordego. Post kelka tempo ĉe la stratangulo alturniĝis lia edzino kun kvar aŭ kvin infanoj ĉirkaŭ si. Proksimiĝante al la pordego, la virino subite lantigis siajn paŝojn, eĉ haltis por momento, poste ekiris al li kurante. Ankaŭ B. komencis kuri, ekster sia konscio. Kiam ili komencis interproksimiĝi, la virino stopiĝis, kvazaŭ ŝi ne estus certa pri la afero; poste ree ekkuris. B. rekonis sur ŝi la grizan longmanikan nigrastran lanskvetron, kiun ĵus antaŭ sia aresto li aĉetis por ŝi en internurba vendejo. Lia edzino estis aparta, neniam antaŭe vidata mikso de karno kaj aero, unika en sia speco. Ŝi superis ĉion, kion en la prizono dum ses jaroj li kolektis en si pri ŝi.

Kiam ili disvolvis sin el sia brakumo, B. apogis sin al la barilo. Kelkajn paŝojn post la virino staradis kvar aŭ kvin knaboj kun scivola sed surprizfrapita vizaĝo. Ili aĝis sep ĝis naŭ jarojn. Ne kvinope ili estis, nur kvarope. B., apogiĝinte al la barilo, esploris ilin po unu.

— Kiu el ili estas la mia? — li demandis.

Tiam la virino komencis plori.

— Ni supreniru! — ŝi diris plorante.

B. brakumis ŝian ŝultron.

— Ne ploru!

— Ni supreniru! — diris la virino laŭte plorante.

— Ne ploru! — diris B. — Kiu el ili estas la mia?

La virino enpuŝis la ĝardenpordegon kaj ekkuris al la domo, malaperis inter la du siringarbedoj en la pordego. Tiel sama svelta ŝi estis ankoraŭ, kiel ĉe ilia disiĝo, kaj kuris kun tiel samaj longaj, elastaj paŝoj, kiel foje en sia knabinaĝo de antaŭ bovinjo, kun la sendisciplinaj sovaĝaj movoj de la timo en la piedoj. Sed ĝis B. atingis ŝin supre en la etaĝo antaŭ la loĝeja pordo, ŝi jam retranskviligiĝis; nur ŝia brusto, ŝiaj knabineskaj mamoj ondis sub la nigraŝtrita svetero. Ŝi ne ploris plu, sed la vangoj subokule estis humidaj pro deviŝitaj larmoj.

— Sola mia — ŝi flustris —, sola mia!

Ŝi sciis flustri tiel, ke oni deziris preni ŝiajn vortojn en la buŝon, ĉiun vorton aparte.

— Ni eniru! diris B.

— En la loĝejo nun loĝas ankaŭ aliaj.

— Mi scias — diris B. — Ni eniru.

— Ĉu vi jam enestis?

— Jes — diris B. — Kiu el ili estas mia filo?

Interne en la ĉambro, la virino surgenuiĝis antaŭ li, klinis la kapon en lian sinon. Grizaj haroj brilis fremdlume en ŝia malhelblonda hararo. — Sola mia — ŝi diris. — Mi ĝisatendis vin. Sola mia!

B. karesadis ŝian kapon. — Ĉu estis malfacile?

— Sola mia — flustris la virino.

La virino ĉirkaŭbrakis lian genuon, premis ĝin al si. — Tia vi estas al mi kiel ĉe nia disiĝo.

— Ĉu mi tre maljuniĝis? — demandis B.

— Dum mi vivos, mi vin amos — flustris la virino.

— Ĉu vi min amas? — demandis B.

Al la virino tremis la dorso, laŭte ŝi ploris. B. prenis ŝian manon de sur ŝia kapo. — Ĉu vi povos al mi kutimiĝi? — li demandis. — Ĉu vi povos al mi retranskviligi?

— Neniam mi amis neniun alian — diris la virino. — Mi vin amas.

— Ĉu vi ĝisatendis min? — demandis B.

— Mi vivis kun vi — diris la virino. — Ne estis tago, en kiu mi ne memorus vin. Mi sciis, ke vi revenos. Sed se vi ne revenus, tiam mi mortus sola. Ankaŭ via filo estis vi.

— Ĉu vi min amas? — demandis B.

— Neniam mi amis neniun alian — diris la virino. — Vi ne povus tiel ŝanĝiĝi, ke mi vin ne amu.

— Mi ŝanĝiĝis — diris B. — Mi maljuniĝis.

La virino ploris, premis al si la gambon de la edzo. B. ree karesis ŝian kapon.

— Ĉu ni povos ankoraŭ havi infanon? — demandis la virino.

— Eble — diris la viro. — Se vi min amas! Starigu!

La virino stariĝis.

— Ĉu mi voku lin supren?

— Ankoraŭ ne — diris B. —, mi volas ankoraŭ kunesti kun vi. Li estas al mi ankoraŭ fremda. Ĉu li restis en la ĝardeno?

— Mi infrenkuros al li — diris la virino —, kaj diros al li, ke li atendu.

Kiam ŝi revenis, B. staris ĉe la fenestro, dorse al la ĉambro. Lia dorso estis kvazaŭ stretiĝinta kaj oblikviĝinta. Li ne turnis sin. La virino por momento restis staranta en la pordo. — Mi diris al li, ke li pluku florojn por sia patro — ŝi diris, iom raŭke de emocio. — Sur la najbara malplena grundo nun floras la siringo, li pluku grandan bukedon por sia patro.

— Ĉu vi min amas? — demandis B.

La virino alkuris lin, brakumis lian ŝultron, kun sia tuta korpo altuŝiĝis. — Sola mia — ŝi flustris.

— Ĉu vi povos al mi kutimiĝi? — demandis B.

— Neniam mi amis neniun alian — diris la virino. — Tage-nokte mi estis kun vi. Al via filo ĉiutage mi parolis pri vi.

B. turnis sin, brakumis la edzinon, atente rigardis ŝian vizaĝon. En la trafenestra vesperkrepuska lumo li vidis malpeziĝinte, ke ankaŭ ŝi maljuniĝis, kvankam ŝi estis pli bela, ol kia li revokis ŝin en sian imagon dum ses jaroj, tago post tago, ree kaj ree. Ŝiaj okuloj estis fermitaj, ŝia buŝo estis duone aperta, inter la elbrilantaj dentoj ŝia varmega spiro trafis la buŝon de B. Sub la densaj okulharoj kuŝantaj sur la pala haŭto, la subaĵoj de ŝiaj okuloj brilis malhele, humide. Ŝi estis la sindono mem. B. kisis ŝiajn okulojn, poste milde li ŝin forŝovis de si.

— Amu ankaŭ nian filon! — ŝi flustris ankoraŭ okulferme.

— Jes — diris B. — Mi kutimiĝos al li. Mi prenos lin en mian amon.

— Li estas via filo!

— Kaj la via — diris B.

La virino brakumis lian kolon. — Mi vin lavos — ŝi diris.

— Estos bone.

Li senvestiĝis. La virino pormetis la liton, kuŝiĝis la nudan korpon de sia edzo sur la littolon. En lada lavujo ŝi alportis varman akvon, krome sapon, du viŝtukojn. Unu viŝtukon ŝi kunfaldis, trempis en la akvon, sapis. La tutan korpon ŝi lavis de kapo ĝis plandoj. Dufoje ŝi ŝanĝis akvon. Al B. kelkfoje ekstremis la manoj, sed lia vizaĝo jam transkviligiĝis.

— Ĉu vi povos al mi kutimiĝi? — li demandis.

— Sola mia — diris la virino.

— Ĉu vi dormos kun mi nokte?

— Jes — diris la virino.

— Kie la knabo dormos?

— Mi metos por li liton sur la planko — diris la virino. — Li dormas tre profunde.

— Ĉu vi restos kun mi dum la tuta nokto?

— Jes — diris la virino. — Ĉiunokte, dum mi vivos.

Tr. K. KALOCSAY

INTRANZMAS

Unu el la gravaj rezolucioj de la Kompleksa Programo celanta evoluigi la ekonomian integradon de la landoj de „Konsilantaro de Reciproka Ekonomia Helpo” — preskribas la pluan evoluigon de la ekonomiaj organizaĵoj de la membroŝtatoj kaj la estigon de novaj internaciaj organizaĵoj. Dum la pasintaj 25 jaroj fondiĝis pluraj komunaj entreprenoj. El inter ili — unu el la plej signifaj estas la Bulgara—Hungara Kompanio „INTRANZMAS”.


La entrepreno fondiĝis en la jaro 1965 por evoluigi, plani kaj efektivigi la mekanikigon kaj aŭtomatigon de la materimovaj kaj deponekonomiaj laboroj, kiuj prezentigas en la popolekonomio de la du landoj. Krome — ĝia tasko estas la evoluigo de la kompleksaj materimovaj sistemoj ene de la uzino por la tuto de la popolekonomio.

La Kompanio planas specialajn lev- kaj frajtmáŝinojn, instalaĵojn kaj kompletajn deponejojn por la — de si jam elformitaj aŭ aliaj — materimovaj, ŝarĝaj kaj deponaj sistemoj. Kiel ĉef-entreprenanto — fabrikas, muntas kaj ekfunkciigas kompletajn máŝinojn, instalaĵojn kaj kompleksajn establaĵojn, kiuj estas necesaj por la ŝarĝaj kaj deponaj procezoj, kaj estas memstare lokigeblaj.

Ĝia eksterlandkomerca rajto ebligis: unue — ke la entrepreno povu kontentigi ne nur la pretendojn de la du landoj, sed ankaŭ por tria lando ĝi povu fari similajn laborojn, — due — povu surprizi la taskon ankaŭ por akiri la necesajn importajn instalaĵojn, materiojn kaj máŝinojn por la realigitaj establaĵoj.

La teknikan evoluon de „INTRANZMAS” helpas grandmezure ĝia eksperimenta metiejo kaj laboratorio, kie oni ekzamenas la plej ekonomian frajtmanieron de kelkaj materioj per matematikaj metodoj, laŭnecese per elektronika kalkulmaŝino.

La celo de la evoluigoj estas la elformigo de tiaspecaj kompleksaj materimovaj, deponaj sistemoj, kiuj karakterizas la unuopajn branĉojn, kaj tiamaniere ili estas uzeblaj kun kelka ŝanĝo en altaĵ, samkarakteraj uzinoj. En la planoj de la evoluigo rolas la estigo de tiaspecaj máŝinsistemoj kaj stablaro, kiuj povas elaste akomodiĝi al la pretendoj.



La 1-an de Januaro en 1974 validiĝis la nova statuto de „INTRANZMAS”.

La modifoj ebligas, ke la Budapeŝta kaj Sofia sekcioj de la Kompanio povu akomodiĝi eĉ pli bone al la popolekonomia medio de la du landoj.

Grandmezure kreskis la pretendo pri la disponigoj, planado, preparado kaj muntado de enuzinaj materimovaj sistemoj.

La Bulgara—Hungara Kompanio „INTRANZMAS” pretiĝis por la kontentigo de la pligrandiĝintaj pretendoj.

INTRANZMAS
Bulgara — Hungara Kompanio

SOFIO 18
Boul. Buxton 40
Tel.: 56-873
1012 Budapest
str. Márvány 17.
Tel.: 886-360

William Auld:

Francis, „la sobra intelekto”

John Francis (n. 1924) estis ano de la Skota Skolo, kies komuna poemaro „Kvaropo” en 1952 manifestis daŭrigon de la laboro de l' antaŭmilita Budapeŝta Skolo en la kadro de la originala Esperanta literaturo. Iom bedaŭrinde, en tiu volumo li reprezentigis nur per unu verko: la longeta poemo „La kosmo”, kiu per nuraj 236 versoj himnas la historion de la kosmo ekde ties neimagebla komenciĝo:

Senvive sin etendas vakua firmamento...

ĝis ĝia same neimagebla finiĝo (per la sama verso).

Tiu poemo estis granda fortostreĉo de la fantazio kaj poezia talento, tamen ĝi spegulis nur unu faceton — eĉ se gravan — de la personeco kaj pensmaniero de la poeto. Estis ĝuste mi, kiu konsilis al Francis, ke li „ne forprenu de la grandiozeco de La kosmo’ per apudmetado de aliaj, malpli gravaj, poemoj”, kaj al mi nun ŝajnas, ke tio estis konsilo maltrafa. Ne sekvis, kiel mi antaŭsupozis, dua volumo de Francis; kaj sekve de tio lia poemaro, kiu parte kaj dise aperadis en diversaj revuoj — notinde, „Esperanto en Skotlando” kaj „La Nica Literatura Revuo” — praktike restas alirebla por la plimultaj legantoj nur pere de tiu elektaĵo aperinta en „Esperanta antologio”. Lia plena gamo restas pli-malpli nekonata; malgraŭ tio, li trovis siajn admirantojn.

Kvankam Rossetti en trafa Rimportreto nomis lin „la sobra intelekto”, tamen grava ingredienco de Francis estas ankaŭ la kompatemo kaj la socia indigniĝo. En „Ombroj en mateno”, ekzemple, li priskribas la sorton de malriĉuloj tranoktintaj en amasloĝejo (konata fenomeno en la tiam Glasgovo, industria urbejo), kaj el profunda kolero kririproĉegas la sociajn kondiĉojn, kiuj premsufokis ilian vivon —

— *damnitajn jam en sia naska horo.*

La hororo de la militoj — tute precipe de la Unua Mondmilito, kies nekredebla elverŝado de sango kaj cinika detruado de milionoj da vivoj obsedas lin — speguliĝas en la abrupta malestimo de „Al malfruantaj solenontoj de la Tago de Rememoro” oni devas:

pensi kiel tajdoj

*de juno, forto, belo manifestis
imponon de la ŝtato, kiam ili
pelate sub la fera hajl’ tempestis
tra koto, karno, putro...*

sed ĉu tiom da sinoferado vere valoris? Aŭ estis vana? La malestimo de Francis trafas tiujn postvivintojn, kiuj rememoras „du minutojn nur”.

Elstara kvalito de lia stilo — kiel en poezio, tiel ankaŭ en prozo — estas la denseco de lia vortprovizo kaj la semantika majesto de liaj figuroj:

*Vi vadis en la maron de l' futuro,
per verva plueniro ĝin kirlante
ĝis ŝaŭmaktivo tiel, ke la spuro
sinuas sur la vasto diamante.*

(„Kalocsay”)

Povas esti, ke liaj traduklaboroj iom kontribuis al tio. Por la „Angla antologio” li faris impone da tradukoj; sed antaŭ ĉio elstaras la 1054-versa Kanto 2 el „Paradizo perdita” — pretendeble la plej densa kaj majesta poezio en la angla lingvo — kiun Francis obstine tradukadis per *precize la sama nombro da versoj*, tiel liverante al la probable malmultaj ĝiaj legantoj versojn nekompareble majestajn:

*Dume la malamik’ de Di’ kaj homo,
Satan’, ekflugas kun aspiraĵoj pensoj
Kaj al pordegoj de Infero vojas.
Foje la dekstran flankon li esploras,
Foje la malan; jen la fundon kilas,
Jen soras ĝis la fajra volb’ konkava
Kiel lontana floto ŝajne buas
Malalte sur ĉielo dum ĝi velas
Laŭ ekvinoksaj ventoj, de Bengalo,
Tidoro aŭ Ternato, kun trezoro
De spicoj drogaj...*

Poste li sin turnis al alia dense elvokiva poezio — tiu de John Keats, kies glorajn odojn li triumfe sukcesis rekrei en Esperanto. Kiel disĉiplo de Pope, Keats kaj Pound en angla lingvo, kaj en Esperanto de Miĥalski kaj Rossetti, Francis zorgis pri la vortoj kaj ame elpemis el ili la lastajn ŝatindajn gutojn de signifo kaj belsono.

Se kiel poeto kaj tradukinto Francis eble ne iĝis tre vaste konata, tamen kiel novelisto li allogis al si la admiron kaj respekton de vastaj tavoloj de la Esperanta popolo. Oni povas konstati, ke li estas majstro de la novelarto, kiu por lia temperamento aparte konvenas. Lia unika volumo „Vitrilo” enhavas dek novelojn, per kiuj vidiĝas pli klare kaj nemiskomprenoble ĉiuj karakterizoj subkuŝintaj la poemojn: la satira sprito, la krueleto bonhumoro, la psiĥologia klarvido, la konsterna aplombo, la sociindigna kompatemo. El la noveloj, kvin transigas nin al landoj fantaziaj kaj mitologiaj, kiuj tamen montriĝas bedaŭrinde similaj al nia realaĵo. En Juglando kaj Gimdalo regas tiranoj kaj despotoj,

La 16-a seminario en Zánka

La Hungara Esperanto-Asocio ĉi-jare en septembro aranĝis jam tradician perfektigan kurson por la gvidantoj de diversaj Esperanto-grupoj.

La celo de instruado: doni helpon, direkton al la aktivuloj, samtempe ebligi praktikon de la internacia lingvo.

Kelkaj temoj el la programo: *Aktualaj mondpolitikaj demandoj; Gvidado — gvidteorio; Nia plej grava propagandilo: Eszperantó Magazin; Instruadaj problemoj; Niaj interrilatoj kun internaciaj asocioj; Taskoj de la ĉi-jara laborplano de HEA; La historio de internaciaj lingvoj — naskiĝo de Esperanto; Propagando inter la gefjunuloj.*

Dum la konsultadoj elformiĝis vigla diskutado rilate al la solvendaj taskoj. La alparolantoj ĝenerale konsentis, ke la rezultoj, sukcesoj kaj ankaŭ fiaskoj de nia movado dependas de la laboro de funkciuloj. Guste tial ni bezonas altigi la agadnivelon de aktivularo.

40 personoj partoprenis en baza aŭ perfektiga lingvo-kurso. Ili vizitis prelegojn kies temaro rilatis al diversaj stiloj kaj gramatikaj problemoj. Por gustumi, ni mencias nur kelkajn el ili:

La gepatralingva reflekso; Vortfarado; Prononco — akcento; Lingvo — sen dialekto; Senco de la vortoj — vortuzado; Sinonimoj.

La matematikaj enigmoj, societaj ludoj — esperantlingve — prezentis la metodon de „lernado kvazaŭ ludante”.

Ekskursoj, tendarfajro, banado en Balatono, danco ktp. troviĝis en la amuza programo.

En la ripozejo de Hungara Fervojista Sindikato gastame oni zorgis pri la cent partoprenantoj de seminario.

Pri la rezulto kaj utilo de perfektiga kurso la ĉiutaga praktiko donos atestilon.

A. Cs.



József Farkas: Knabino kun floro

kies kapricetojn — glormilitojn kaj mortkondamnojn — Francis satire primokas per tono tranĉe kulturita. Ankaŭ svatinda reĝino montriĝas iom kaprica:

En certaj cirkonstancoj sprito tre plaĉis al la reĝino. En la nuna okazo ne estus malfacile konjekti la mankon de tiaj cirkonstancoj; ĉar, kiam ŝi rigardis Gajornon, malhelaj pensoj flirtis malantaŭ ŝiaj okuloj.

„*Cu vi enuas la vivon?*” ŝi demandis mallonge.

Gajorno silentis, kaj ŝi daŭrigis: „Eble vi pensas, ke pro la multaj viroj, kiuj jam pereis en tiu ĉi palaco, mi tute indiferentas, kiam novaj mortas. Se jes, vi eraras. Se vi mortus nun ekzemple, mi opinias, ke strangaj sentoj regus min; ĉar mi estas sentema homo.”

„Foje estas pli facile morti ol vivi,” sentencis Gajorno.

„Kaj pli rapide,” respondis kuraĝige la reĝino, kiu malŝatis sentencojn, „ĉar la periodo inter plena vivo kaj plena morto estas nemezureble malgranda, kaj tamen morti signifas

simple trapasi tiun etegan fazon, dum vivi postulas multe pli longan tempon; do, por homo, kiu ekenuas la vivon estas konsilinde — — —”

„Sed mi ne enuas la vivon. Male, mia vivo nur nun komencas havi signifon,” fervoris Gajorno, konsciante, ke lia afero iom regresis lastatempe.

(„La bela reĝino”)

La ceteraj noveloj — almenaŭ, kvar el ili — pli rekte koncernas nian mondon kaj vivon. „La tuŝo de Morto” priskribas efektivan travivaĵon dummitan de Francis, kiu servis kiel aviadila pafisto. „La vidvino Pirsen” tre klare reliefigas la homaman kompaton de Francis, ĉar ĝi fidele priskribas la vivon de izolita maljunulino. „Okazos je la deka” estas ordinara ŝokrakonto. „Germoj en rikolto” ŝajnas al mi probable la vera majstroverko de la aŭtoro: priskribante aŭtentike la vivon de kamparaj infanoj, li atingas grandiozan alegorion, laŭ kiu la homaron disŝiras la frenezuloj.



John Francis (maldekstre) kun Régulo Pérez en Edinburgo, 1963

La kvina novelo, „Kiel kaj kial Jurgen turniris por damo Liza”, estas mildatona sed akrevida satiro pri Esperanto kaj la esperantistoj — surprize malofta temo inter ni, kiun Francis tre ŝajnafable ekspluatas.

Mi ŝatus skribi pri li ankaŭ kiel romanisto, sed ho ve! lia longega kaj grava romano, „La granda kaldrono”, ankoraŭ ne sukcesis eldoniĝi, malgraŭ promesoj. Eble iam...

El „La kosmo” (1952)

V. La fino

La lastaj sunradioj la universon lasas; pri ties mort’ depeŝoj sin ŝutas tra malhelo: sed malgraŭ fulmrapido jarcentoj preterpasas, antaŭ ol ili trafas ĉe plej proksima stelo.

Antaŭen tra nigreco filtriĝas la lumstrioj, kaj dum vojaĝ’ senfina atingas kaj preteras kvindek mil milionojn da stelaj familioj; tra tuta nebulozo sunmorton kurieras.

Sur mondoj nur ĝermantaj je morto de la suno nun teleskopoj baŭmas, serĉante svinge, rostre. Preceptas la estingon en sia propra nuno estaĵoj, kiuj vivas jarmilionojn poste.

Ĝis nebuloza bordo, pretere, tra la nulo, ĝis nebulozoj fremdaj la lumo plueniras, kaj dume universoj laŭ evolu-formulo naskiĝas, elburĝonas, en degener’ forspiras.

La tera interludo milfoje kaj milloke roliĝas ĉiam same laŭ la esencaj celoj — triumfo kaj formorto; sed ĉiam, neĝofloke, en drivaj nebulozoj masiĝas novaj steloj.

La nebulozoj drivas unu de la alia al limo de la kosmo disiĝe kaj konstante. Pro vasto de l’ procezo, senmovo iluzia ankoraŭ regas ĉie, eternon mensogante.

Sed jam la astroj raras: kie antaŭe mikse kunsvarmis la mortantaj kun la embriaj steloj, jen nur mortantaj restas: nenie plu fenikse ekflamas posteuloj de l’ forbrulintaj ŝeloj.

La astroj daŭre dronas en la mallum’ avida ĝis cindre dispeciĝas la lasta steltaĉmento; kaj, ĉie konsumita de paraliz’ insida, senvive sin etendas vakua firmamento.

El „Vitrulo” (1960)

La turniro

(Fragmento el la novelo „Kiel kaj kial Jurgen turniris por Damo Liza”. En tiu novelo Francis satire sed iom oblikve pritraktas diversajn flankojn de la Esperanto-afero. Ĉi tie, la Kalvaliro estas Karlocsay, kiun la filistroj siatempe atakis pro liaj lingvaj t.n. aŭdacaĵoj. La blatanto estas alegoria monstro, elpensita de la angla poeto Edmund Spenser.)

Subite la tumulto de la amaso ĉesis, kaj Jurgen rimarkis, ke tra pordego en la kontraŭa flanko de la areno rajdis giganto portanta arĝentan armilaron inkluzive ŝildon kun blazono de ĉefa nuko kaj baza pugno. Jurgen spontane aplaŭdis la kontraste bravan figuron, spite la ŝokitajn rigardojn de la aliaj spektantoj.

„Kiu estas tiu kavaliro?” li demandis al la najbaro.

„Ne ’kavaliro’, sed ’kalvario’, per metatezo,” korektis tiu. „Aŭ ’kalvaliro’ kun truda ’l’ ankaŭ estas permesata.”

„De viaj najbaroj, tiuj de Logio?” sugestis Jurgen.

„Ni ne aprobas mokojn pri niaj najbaroj,” la alia sciigis. „Ili jam malagnoskas nin, kaj tial ni devas esti humilaj.”

„Laŭ kiu logiko?” Jurgen ĉikanis.

„Laŭ la logiko, ke ni volas ricevi agnoskon de ili, kaj penas konvinki ilin, ke ni ne celas esti plenaj homoj, kiel ili; sekve ili ne perdos prestiĝon agnoskante nin. Do, kial inciti ilin?”

„Mia sperto sugestas, ke vi ne konvinkos ilin ĉiuokaze,” verdiktis Jurgen.

La turniro komenciĝis, kaj Jurgen entuziasmis pri la lerto de la giganto, kiu karakolis facile, kvazaŭ ĉe menaĝo, fintante la venenitajn sagojn de la pigmeoj, kaj deturnante ilin per la ŝildo kun tolerema rideto.

„Mi ne komprenas, kiel la spektantoj povas esti tiel apatiaj,” Jurgen flustris al la blatan. „Vidu: ili promenas el kaj en la amfiteatron, kvazaŭ tiu ĉi estus unu el iliaj ordinaraĵoj spektakloj. Kial?”

„Ĉar,” la blatan klarigis pacience, „ĉio ĉi okazis antaŭlonge. Okazis multfoje ĉiam kun sama rezulto, kiun ili neniam perceptis. Sekve, ili estas teditaj jam konante la movojn, kaj nur relative entuziasmas, ĉar ili povas ŝajni al si, ke ili ne konas la rezulton, kaj sekve kovas esperojn pri la falo de la Kalvaliro; sed eĉ tiu anticipita ĝuo havas cindran guston, ĉar ili subkonscie konstatas, ke la falo de la Kalvaliro estus la falo de ili ĉiuj, kaj tio estas la plej amara konstato el ĉiuj.”

Permesinte la pigmeojn pafi ĉiujn siajn sagojn, la giganto nun elseligis ilin unu post alia, ĉiam per renverso de la lanco batante per la senpinta fino.

„Kial li faras tion?” demandis Jurgen kolere. „Li devus ekstermi tiujn aĉulojn.”

„Se li ekstermus tiujn, aliaj anstataŭus ilin,” la blatan atentigis. „Li preferas re-renkonti tiujn ja iel purigitajn en la fajro de batalado kontraŭ li.”

La falintaj pigmeoj rifuzis agnoski sian venkiĝon, sed kuraĝigite de la spektantoj provis ponardi la dorson de la giganto, aŭ la ventron de lia ĉevalo; sed la Kalvario facile forbatis tiujn provojojn, dume forbalaante rajdantojn el iliaj seloj, ĝis per fina falĉanta ŝvingo li sternis la tutan trupon sur la sablon.

Jurgen salte ekstaris por aplaŭdi la venkegon, kaj provis kubutumi sian najbaron; sed tiu jam marŝis kelkajn paŝojn for, turninte la dorson al la areno, kaj staris silenta. Kaj Jurgen rimarkis, ke prema silento ekestis en la tuta amfiteatro, kaj ke ĉiuj spektantoj prezentas la dorsojn al la areno, kaj ke sole li frontas ĝin, kaj duon-frontas ĝin la blatan, kies patro estis poeto. Kaj Jurgen konstatis, ke granda maljusto okazas, kaj Jurgen kriis indigne:

„Agnosku la venkon de tiu Kalvaliro, ĉar spite al ĉio li venkis, kiel devas atesti ĉiu prudenta kaj justa homo. Do atestu.”

Sed la spektantoj unuanime respondis, ankoraŭ ne turnante la kapojn:

„Ne, ne, ni ne atestas, ĉar ni kredas, ke li malvenkis.”

Kaj restis silenta sole la blatan, kies patro estis poeto.

Kaj Jurgen denove levis sian voĉon protesteme: „La venkego de la Kalvaliro estis komplete, kiel ĉiu povas vidi nur turnante la kapon; ĉar tie sur la sablo kuŝas la pruvo. Nur rigardu!”

Sed la spektantoj unuanime respondis, eĉ ne turninte la kapojn:

„Ne, ne, ni ne rigardos, kaj kiel ni povos vidi se ni ne rigardos?”

Kaj Jurgen provis trian fojon, kriante kolere: „La venko de la giganto estas tute klara, kiel eĉ

la plej miopaj el vi povas percepti. Do vidu, kaj agnosku ĝin; ĉar tiam tiuj mizeraj pigmeoj devos tute cedi kaj malaperi, kaj vi havos verajn turnirojn kun ĉampionoj kontraŭ ĉampionoj. Se vi obstine malagnoskos, la Kalvaliro enue rezignos, kaj restos nur mizero kaj veneno, kiu fine venenos vin ĉiujn. Por propra prospero do, rigardu kaj agnosku.”

Sed la spektantoj respondis unuanime ankoraŭ ne turnante la kapojn:

„Ne, ne, ni ne rigardos, nek agnoskos, kaj ni scias, ke la pigmeoj venkis, kaj ili estas niaj veraj ĉampionoj.” Kaj dum ĉio ĉi silentis sole la blatan, kies patro estis poeto.

Kaj nun la areno estis malplena, ĉar la giganto jam forraĵdis, kaj oni forportis la pigmeojn, kaj la spektantoj returnis sin kaj revenis al siaj lokoj. Kaj la najbaro de Jurgen ridetis, kaj demandis al Jurgen, kiel plaĉis al li la gajno de la pigmeoj: rezultato, kiun li neniam pridubis.

„Ne surprize,” komentis Jurgen acide, „se vi foriras, kaj turnas la dorson por eviti kontraŭan konvinkiĝon. Ĉu tiel oni juĝas ĉe la turniroj en Istrio?”

„Sed kompreneble,” estis la respondo. „Kial nomi ilin turniroj, se oni ne turniras. Mi vidas, ke homoj ne zorgas pri vortoj en via lando, amiko.”

„Nun mi perceptas, kia vi estas,” Jurgen anoncis.

„Kaj mi komprenas vian konekson kun Logio, kaj kun viaj kuzoj en Philistia: kaj la ekzisto de vi ĉiuj estas same dubinda, ĉar vi estas ĉiuj filoj de la sama sterila praavo, kun aŭ sen logo al la filoj, kaj plugas saman sterilan grundon. Kaj vi pretendas grandan intereson pri la ricevo kaj transmeto de finaĵoj kaj volas imponan ekskluzivon bazitan sole sur tio, kio imponas, logas kaj distras vin, kaj la limojn inter vi vi ne povas difini per nuraj ŝonglaĵoj, nek logo-ricevo, nek distro-sendo, ĉar via simileco estas pli evidenta ol viaj supraĵaj diferencoj. Kaj mi kompatas vin en Istrio, ĉar mi perceptas, ke la homoj, kiuj malestimas vin, kaj kiujn vi tiel alte estimas, ne povas tuŝi vin, sed vi detruas vin mem ne agnoskante viajn fortojn. Sed viaj problemoj ne estas miaj problemoj, ĉar mi venis sole por trovi mian edzinon.” Kaj Jurgen turnis sin renkonte al la oficisto, kiu alproksimiĝis.

INTERKONSENTO KUN USONAJ BANKOJ

En Budapeŝto kompetentuloj subskribis interkonsenton, ke la Usonaj Bankoj pruntedonos 100 milionojn da USA-dolaroj al la Hungara Nacia Banko. La limtempo de la amortizo estas post 8 jaroj, kaj la kondiĉoj estas favoraj. La prunto organizis la Banko Kuhn Loeb and C-o en New York kaj en la notado partoprenis 20 bankoj el Usono kaj Kanado. Inter ili troviĝas en Usono la Bank of America kaj Chemical Bank, en Kanado la Bank of Montreal kaj Bank of Nova Scotia. La prunto akcelas la modernigon de produktado kaj la plimultigon de eksporta kapableco.

D-ro Ferenc László:

Krom Balatono nia plej granda estas la lago Veneco

La lago Veneco estas unu el la plej gravaj bazoj de la ripozum-kulturo* de nia lando. Ĝia akvo estas tre konvena por banado, por fiŝhokado kaj por la akvosportoj, krome ankaŭ la ĉirkaŭaĵo proponas multe da interesaĵoj. La malkovro de la valoroj de la lago estas relative freŝdata, tamen la interesiĝo pri ĝi tre kreskis lastatempe.

La vilaĝojn Veneco kaj Gárdony oni deklaris oficiale ripozum-lokoj jam en 1930, sed tiun karakteron ili atingis efektive nur en la lastaj 10 jaroj. Ĉe la suda bordo de la lago, ekde Veneco ĝis la vilago Dinnyés, la kvanto de la malnovaj kaj novaj ripozum-parceloj superas la nombron 10 000. Sur preskaŭ 90 procentoj de tiuj parceloj oni konstruis bon-etosajn, pliparte estetikajn semajnfinajn somerumajn domojn, kiuj fariĝadas pli kaj pli komfortaj.

La saniga lago

La sanigan efikon de la banlokoj ĉirkaŭ la lago Veneco pruvas jam ankaŭ la medicino. *La akvo de la lago estas natrio-hidrokarbonato- kaj natriokarbonato-hava* krome ĝi entenas magnezion kaj sulfaton en konsiderinde pli granda kvanto ol Balatono. *Sekve de sia konsisto ĝi estas taŭga por sanigi la korpan aŭ spiritan elĉerpitecon, la senapetitecon, iajn perturbojn de la metabolo, kelkajn malsanojn de la mov-organoj kaj diversajn specojn de la nervozeco.* Reŭmatologoj povas utiligi — krom la jam menciitaj komponantoj — ankaŭ la altan sulfurhidrogeno-enhavon de la akvo.

Inter la sanigaj faktoroj menciinda estas la ŝlimo de la lago. Ŝlimo-analizo farita en 1953 montris, ke en ĝia konsisto la natrio-hidrokarbonato kaj magnezio estas precipe gravaj, sed ĝia karakteriza komponanto estas ankaŭ la sulfurhidrogeno. Krome — inter organikaj substancoj — en granda kvanto troviĝas en ĝi t.n. ekstraktaj bitumen-materialoj. Pro la favora proporcio de tiuj substancoj *la ŝlimo de la lago Veneco — simile al tiu de la lago Hévíz — estas tre taŭga por la t.n. ŝlim-kompresa kuracmetodo.* (La lago Hévíz estas fama varmakva kuracbanejo proksime de la sudokcidenta angulo de Balatono — rim. de la tradukinto.)

Antaŭ kelkaj jaroj la Landa Komunsanitaria Instituto malkovris enhavon de radiuma emanacio (radono) en la fontoj de la montoj apud la lago Veneco, unuavice proksime de la vilaĝo Sukoró. La fonto Borjúkút ĉe Sukoró, per sia radon-aktiveco de 7,4 milimikro-

kurioj okupas en nia lando la altaran trian lokon post la banejoj Rudasfürdő en Budapeŝto kaj Tükörfürdő en urbo Eger.

Ĉe la norda parto de la lago staras la 352 m alta monto Meleg. Ĝia granita maso varmigas la venton, kiu malsuprenruliĝante liveras radiante varman aeron en la direkto de la banlokoj. La favora situo de la lago, la ĉirkaŭe starantaj montoj, la sunradio reŝpeguliĝanta sur la surfaco de la lago, ĉiuj ĉi formas la cirkonstancojn por sun- kaj aerbanado eksterordinare favoraj. En la kuracado estas laŭcele utiligebla ankaŭ la *alta fluor-enhavo* de la fontoj sur la norda bordo.

La lago Veneco estas averaĝe du metrojn profunda. Meze de la lago, ĉe kelkaj senkanejoj, oni povas trovi ankaŭ 3 — 3½ metrajn profundojn, precipe ĉe la okcidenta parto de la lago. Tiujn senkanejojn oni povas alveni tra la „stratetoj” de la kanaro kaj la unuopajn senkanejojn interligas t.n. „pordegoj”. La velboatistoj kaj remistoj neniam povas forgesi la *romantikecon de la lago*, la milon da travivaĵoj, kiujn ili havigis al si aventurvojaĝe en la kanaro.

La lago Veneco plezurigas multajn milojn da sportistoj-fiŝhokistoj. Ĝi estas rigardata kiel unu el la plej bonaj karpokaptejoj en Eŭropo, sed ankaŭ siluro kaj ezoko ofte tie surhokiĝas.

La lago proponas eminentan eblecon ankaŭ por la *velboatado*, kaj krome — ĉar la ondoj estas multe pli malaltaj ol tiuj de Balatono — tie ankaŭ la *remosporto* estas pli favora kaj sendanĝera. Pro la kanejoj la plej uzebla boatotipo estas la kajako.

Planoj kaj rezultoj

La rapidega prikonstruo de la ĉirkaŭaĵo de la lago Veneco estas ŝuldebla al la laŭplana, pripensita, kompleks-karakterata laboro de la *Aranĝkomitato por la lago Veneco*. El tiu laboro konsiderindan parton entreprenis la regionaj organoj de la landa akvoafera servo. En la tuta longo de la suda bordo oni komencis la reguligon de la bordo, la grandaskalan niveligon de la bordoflanko per alportado de amasa kvanto da tero kaj la konstruadon de la definitivaj betonaj bordomuroj. Komenciĝis la konstruo de akvoproduktejo kaj akvokondukila retaro. Rezulte de tio, somere de la nuna jaro oni ekfunkciigis la Regionan Akvoproduktejon de la lago Veneco. Tio havas eksterordinare grandan signifon, ĉar la laborulo en sia libera tempo volas ĝui ne nur la belaĵojn de la naturo, sed li pretendas loke de sia ripozado ankaŭ la teknikon kaj la kulture certigitan komforton. Samtempe kun la estigo de la Regiona Akvoproduktejo oni instalas ankaŭ la kanalizadon.

La forkondukado de la sovaĝaj akvoj, la bordoŝirmado, la urbanizado tre baldaŭ igas pli kulturita la

* ripozumi = en kiu ajn sezono ĝui ferton aŭ semajnfiron ĉu apud akvo, ĉu en montara aŭ arbara regiono, en ripozdomo, tendaro aŭ kampadejo, ripozante, banante sin, ludante, promenante, ekskursante aŭ sportante, por refreŝiĝi korpe kaj spirite kaj tiamantere kolekti forton por la plua ĉiutaga laboro.



tutan sudan bordon de la lago Velence kaj kreskigas la civilizitecon de la tuta teritorio.

En nia artikolo ni ne intencas trakti ĉiujn taskojn de la medio-ŝirmado en la regiono de la lago Velence,

sed ni deziras resumi *la farendojn koncerne la ŝirmadon kaj evoluigon de la homa medio* nur vidpunkte de la akvomastumado.

La solvendaj taskoj de la akvomastumado havas bazodonan karakteron ankaŭ koncerne la lagon Velence. Sen ilia plenumo la plua evoluigo estas nebla. Bone spegulas tion la registara rezolucio n-ro 1009/1969, kiu — interalie — jene instrukas:

„Dum la disvolvo de la ripozumaj teritorioj oni devas solvi la sekvantajn taskojn:

a) Por teni la akvosurfacon de la lago Velence sur *proksimume konstanta nivelo* estas pli rapide pretigenda la akvorezervejo de kvar milionoj da kubmetroj ĉe vilaĝo Zámoly, estas konstruenda la akvorezervejo de 11 milionoj da kubmetroj ĉe vilaĝo Pátka, krome estas pligrandigenda la akvo-trapasa kapacito de la deflua kanalo Dinnyés-Kajtor;

b) estas *reguligenda la lagobordo* — escepte la bordo-sekcion kaj ties kanokovritan ŝirmozonon en la tiea naturrezervejo — per la kelkaloka forigo de la apudbordaj kanozonoj kaj per estigo de bordoŝirmaj konstruaĵoj, kombinita kun terniveligo en la postaj areoj;


c) estas gardenda la *biologia ekvilibro de la akvo* de la lago, kiocele oni devas zorgi pri la sistema efektiveco de la konservado de la lago kaj lagofundo (aluvio-forskrapado, ekstermo de la subakva vegetaĵo, pretigo de trakanaraj vojoj por helpi la akvomovon k.t.p.)

d) La ripozumaj teritorioj estas provizendaj per sana *trinkakvo*; tial oni devas konduki la someran superfluan akvon de la apud-Danuba akvoproduktejo de la sukerfabriko en vilaĝo Ercsi al la regiono de la lago Velence kaj tiel estigi tie regionan akvoprovizejon;

e) estas konstruenda la regiona *kanalizacio* per estigo de kanaleta rondretaro kaj per starigo de *biologia akvopurigejo*, por forkonduki la malpurajn akvojn de la ripozumaj teritorioj situantaj norde de la ŝoseo n-ro 70.

La cititaj punktoj de la registara rezolucio bone resumas la plej gravajn akvomastumajn farendojn. Por realigi ilin, oni jam faris multon ekde la apero de la





rezolucio, sed tio estas rigardebla nur kiel komenca rezulto, ja la pli signifa parto de la taskoj estas ankoraŭ plenumota. Ci-sekve ni volas doni mallongan resumon pri la karaktero de la unuopaj taskoj, pri la faritaj laboroj koneksaj kun ili kaj pri la taskoj de la venontaj jaroj.

La akvonivelo de la lago estas ŝanĝigema. Laŭ la ĝisnunaj esploroj ĝi alternas inter + 234 kaj + 63 cm. Inter la du ekstremaj valoroj de la aprila maksimuma kaj la oktobra minimuma niveloj estas 170 cm-a diferenco. Tiu granda fluktuo estas samgrade malavantaĝa kaj por la agrikulturo kaj por la kanoproduktado, kaj por la fiŝkaptado kaj por la evoluado de la apudbordaj ripozumaj teritorioj. Ĉe malalta akvonivelo, pro la pli forta varmiĝo de la malprofunda akvo malpliĝas ĝia oksigen-enhavo, kio minacas pereigi la fiŝaron, kaj pro kio ankaŭ la kano malbone kreskas. Krom ĉio ĉi la malalta akvonivelo estas favora al la multiĝo de la kuloj. Male, ĉe alta akvonivelo, kultivitaj kampoj kaj ripozumaj teritorioj venas sub akvon, fariĝas pli malfacila la dehakado de la kano kaj la konusojn kunmetitajn el la faskoj de la rikoltita kano in-

undas la akvo. Kiel ĉe Balatono la organizita, kulturita vivo de la ripozumantoj povis komenciĝi nur post la reguligo de la akvo, tiel same ankaŭ ĉe la lago Velence *unu el la plej gravaj taskoj estas la konstantigo de la akvonivelo*. Koncerne la akvonivelon la akcepteblaj valoroj troviĝas inter + 140 kaj + 180 cm-oj, kaj interne de tiuj limoj la 160 cm-a estas rigardebla kiel laŭeble fiksenda akvoalteco. Okaze de tiel malvastiĝita fluktuo — kondiĉe ke ankaŭ la ceteraj kondiĉoj (konstruo de bordomuro, reguligo de la apudborda areo k.t.p.) estas certigitaj — ĉiuj interesoj estas kontentigeblaj. La konstantigon de la akvonivelo inter la menciitaj limoj oni povas realigi unuflanke per teknika akvokompensado (akvorezervado), aliflanke per konstruo de forkonduka defluilo kun la necesa kapacito.

Por povi teni la optimuman akvonivelon, difinitan baze de ĝisfundaj hidrologiaj kaj biologiaj observoj, kaj por malpliigi la nivelfluktuojn, fariĝis necesa la konstruo de la akvorezervejoj de Zámoly kaj Pátka, sur la rivero Császár-víz. El ili en 1970 pretiĝis la rezervejo de Zámoly, kies tasko estas kompensi la akvoperdojn kaŭzitaĵn de la somera forvaporado kaj krome reteni la inundojn alvenantajn en Császár-víz, kiuj malutilte altigas la akvonivelon de la lago. La akvorezervejo de Pátka estas konstruata.

La forkonduko de la superflua akvo kaj la akvoŝanĝo de la lago estas realigebla helpe de la kanalo Dinyenyés-Kajtor. Ĝia rekonstruo kaj la pligrandigo de ĝia kapacito per plusa 6 m³/sec komenciĝis en 1972. La jam plenumitaj kaj post nelonge plenumotaj priakvaj laboroj certigos la ordigitan trankvilan vivon kaj evoluon de la lagobordo.

Akvokvalito-ŝirmado

Pro la malgranda profundeco de la lago kaj pro la limita ebleco ŝanĝi la akvo-mason oni tre devas zorgi pri la bona kvalito de la akvo. Plimalbonigas la situacion, ke en pluraj lokoj en eksterordinara grado multiĝis la akva plantaro. Tiu cirkonstanco forte influas ankaŭ la eblecojn de la baniĝado.

Ekde la nordokcidenta angulo de la lago ĝis nordorienta parto, la kemia konsisto de la akvo esence ŝanĝiĝas pro la efiko de la alfluanta freŝa akvo. Por havi akvon kun taŭga kvalito estas necese purigi la akvon. Tiocele oni devas malhelpi la troan plimultiĝon de la akva plantaro, estas necese forigi la amasiĝintan kaj kelkloke putrantan ŝlimon kaj zorgi pri la refreŝigo de la akvo. (La lastan ebligas la akvorezervado.)

En 1969 komenciĝis la malkovra esplorlaboro celanta la ekkonon de la lago. Kadre de tiu laboro estis pretigita hidrologia atlaso titolita „Velencei-tó kaj ĝia akvo-kolekta areo”.

Helpe de tricio-esploroj* oni difinis la restadejon (kolektiĝejon) de la pluv-akvo kaj komencis primezuri la eŭtrofizojn** de la lago.

En la Akvomastroma Scienca Esplorinstituto en Budapesto oni faris permodelajn eksperimentojn por difini, en kia mezuro estas necese malfermi t.n. ventovojojn sur la kanokovritaj surfacoj de la lago: helpe tiaj nome oni povas pliintensigi la akvo-moviĝadon kaj ĉi tio kontribuas al la pliboniĝo de la akvokvalito. La model-esploroj finiĝis en 1971 kaj baze de iliaj rezultoj okazas nun la fundo-priskrapadoj kaj la demeto de la elskrapaĵoj.

Por la ŝirmado de la akvokvalito necesas rigoraj instrukcioj ankaŭ tiurilate, ke nek en la lagon, nek en ĝiajn nutrantaĵajn alfluojn oni povu enkonduki malpuran akvon, ĉar ĉi tiu nur pliintensigus la eŭtrofizojn.

* tricio = peza hidrogeno, kun atomnumero 1, atompezo 3. (PIV).

** eŭtrofizo = maljuniĝo de la akvoj sekve de riĉiĝo je mineralaĵoj, kiuj nutras la akvaj vegetaĵojn.

Bordoreguligaj laboroj

La bordoreguligo estas grava parto de la kompleksa evoluigo de la lago Velence. Sur la suda kaj norda flankoj de la lago — escepte la naturrezervan teritorion — oni devas konstrui definitivajn bordojn en longo de ĉ. 17 km. Malantaŭ la bordomuroj, ĝenerale ĝis + 210 cm-a nivelo, oni pretigas digon por preventi inundon kaj por forkonduki la grundakvon. Sur la plej frekventata bordosekcio la bordoreguligo estas jam preta en konsiderinda longo, nome norde de la strando de Agárd konstruiĝis 1,5 km-ojn longa definitiva bordo, kaj, per la materialo elskrapita el la kanaro troviĝanta antaŭ tiu sekcio, oni digas la post-bordomuran areon en la necesa alto. Jam antaŭ kelkaj jaroj oni finis la konstruon de la bordosekcio ĉe la t.n. Béke-strando, sudokcidente de la haveno de Agárd. Tie oni estigis ankaŭ apartajn havenojn kaj por la velboatistoj kaj por la fiŝkistoj, krome banbasenojn por naĝistoj kaj por infanoj, je la granda ĝojo de la baniĝantoj kaj sportistoj.



Signifa laboro estis la reguligo de la norda bordo ĉe vilaĝo Velence; tie oni konstruis pli ol unu-kilometran bordosekcion, post kiu, sur la terplenigita areo, oni estigis — ligitan al la debranĉiga subŝoseo de la ĉefŝoseo M 7 — plaĝon por aŭtistoj. La bordokonstruaj laboroj, kiujn la projektoj preskribas, daŭras plu kaj sur la suda kaj sur la norda bordoj, strikte adaptite al la kompleksaj planoj de la evoluigo. Dank' al la ĝis nun faritaj fortostreĉoj, Velence-lago estas unu el la landaj bazoj de la akvaj sportoj (remo, kajakado, velado k.t.p.), kaj estos ankoraŭ pli en la estonteco. La kvaran jaron en Agárd kaj Velence funkcias la Akvo-sporta Lernejo de la lago Velence, kaj la rezulto de ĝia aktivado jam estas konstatebla en la tutlandaj junularaj sportkonkursoj.

Trinkakvo-provizado, kanalizacio, forkonduko de la malpura akvo

Por povi kontentigi sur moderna nivelo, en ĉiuj rilatoj, la rajtajn pretendojn de la ripozumantoj, sportantoj kaj ekskursantoj, kiuj ĝuas la agrablan akvon de Velence-lago kaj la belecon de la pejzaĝo, estas nepre necesa ankaŭ la solvo de la akvoprovizaj kaj kanalizaciaj taskoj. La laŭplana evoluigo tiukampe signife influas la ritmon de la konstruado de somerumaj kaj komunumaj domoj, alivorte la elformadon de novaj ripozumaj regionoj.

Pro la nesufiĉeco de la akvoprovizo, trovebla en la ĉirkaŭaĵo de la lago, oni devas liveri la trinkakvon disde granda distanco — disde la gruz-teraso de Danubo ĉe vilaĝo Ercsi — al la ripozuma teritorio. Bonŝanca cirkonstanco estas, ke la funkci-periodo de la sukerfabriko en Ercsi kaj la pli granda trinkakvo-bezono de la somera ripozuma sezono ne koincidas. Tiamaniere ambaŭ bezonoj estas kontentigeblaj.


Koncerne la trinkakvo-provizadon oni laboras laŭritme, sekvante la koncernajn planojn. Antaŭ nelonge oni transdonis ekzemple la trinkakvo-telekonduktilon, helpe de kiu jam en la komenco tage 8.000 m³ da bonkvalita trinkakvo estas je la dispono de la loĝantaro kaj de la tieaj ripozumantoj. Oni elkonstruis la Akvoproduktejon de Kápolnásnyék (vilaĝo proks. de la lago — rim. de la tradukinto) kun senferiga instalaĵo, konstruiĝis ĉ. 70 km longa interna trinkakvo-reto, kiu estas sufiĉa por provizi pliajn 3 500 ripozum-parcelojn.

Konforme al la projektoj estas kontinue konstruata ekde Agárd, tra Velence, la regiona ĉefkanalo por malpura akvo, kiu kanalo servas la ŝirmadon de la bona kvalito de la lagoakvo. Per tio iĝas ebla la kanalizacio de pluraj miloj da ripozum-parceloj parte jam ekzistantaj, parte elformotaj.

Laŭ la planoj estas necese konstrui 6 km-ojn da ĉefa kaj 36 km-ojn da akcesora malpurakvo-kolekta kanalo. La kolektitan malpuran akvon oni povas transigi en la ĉefkanalon helpe de tri interlokigitaj lev-instalaĵoj. Konsidere de la kreskanta kvanto de la malpura akvo la Akvo-purigejo de Agárd estas preparenda por akcepti kaj repurigi komence tage 2 500, kaj fine de la periodo de la kvina (tutlanda) kvinjara plano tage 4 500 m³-ojn da malpura akvo.

La ekfunkciigo de la urbanizaj instalaĵoj de la lago Velence kreas la eblecon, ke jam en la proksimaj jaroj en ĉiam pli granda nombro povos pasigi ĉe la bordo de la lago sian liberan tempon tiuj, kiuj serĉas tie refreŝiĝon aŭ resaniĝon.

Trad.: Tibor ÚJLAKY-NAGY



ESPERANTA PUPTEATRO

Interparolo kun Anna Bánd

Redaktoro de artista gazeto, kiu tre laŭdis al mi Esperanton, kvankam li mem ĝin ne parolas, petis min verki artikolon pri artistoj-esperantistoj. Dum kolektado de materialo, Anna Bánd, la konata pupteatra aktor-artistino oferis kompleze tempon por mia helpo. Post niaj interparoloj mi sentis, ke ĉi tiun temon estus inde pri-trakti ankaŭ Esperante.

Mia unua demando al ŝi estis:

— Kie kaj kiel ĝi komenciĝis?

— Ĝi komenciĝis en mia infanaĝo. Tiam mia familio loĝis en la urbo Subotica (Jugoslavio) kaj mia fratino tie partoprenis en la laborista movado kaj ellernis la lingvon. De ŝi ankaŭ mi lernis iele-tiele Esperanton, sed poste, dum la paso de la jaroj, forviŝigadis en mia memoro mia kelkvorta lingvo-kono infanaĝa. Sed en 1966 okazis en Budapeŝto Universala Kongreso de Esperanto, kaj tiam HEA sendis alvokon al la pupteatro lerni la lingvon kaj prezenti esperantlingvajn pupteatraĵojn dum la kongreso por la infanoj. Je la alvoko reviviĝis en mia memoro mia infanaĝa plezuro pri Esperanto kaj mi, kun grupo de pupaktoroj, komencis ree lerni la lingvon kaj ni ankaŭ prezentis marionetludon sub mia gvido.

— Ĉu vi lernis la lingvon facile?

— Mi parolas la lingvojn serbokroatan, francan, anglan, do mi lernis E-on tre facile, en kvaronjaro. Mi estis severa al mi mem. Kiam mi lernis vespere, kuŝante en la lito, mi metis la vortaron sur la plej supran breton. Se mi ne memoris iun vorton, ree kaj

ree mi devis leviĝi por serĉi ĝin en la vortaro.

— Kiel do vi havis tian lerne-mon, ke vi elmetis vin eĉ al tia torturo?

— Certe influis min ankaŭ la infanaĝaj rememoroj, sed mi estis ravata de la lingvo, tiel belsona, facila, logika ĝi estas. Kaj mi estas tre fiera, ke post Zamenhofa memorgespeto, en kiu mi prezentis verkaĵojn, Imre Ungar, la karmemora fama hungara pianisto, laŭdis mian belan prononcon, bonan akcentadon. Sed ĉi tion ne skribu, mi petas.

— Kion vi ludis post tiu Budapeŝta kongreso?

— Unue en 1968 ni ricevis inviton al la Zagreba Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). De tiam la Hungara Ŝtata Pupteatro partoprenis tie en ĉiu jaro: ni ludis fabelojn de Andersen, „Ĉu esti aŭ ne esti” de Marjorie Boulton, la „Ora Ŝlosilo” ktp. Ni ludis ankaŭ la Shakespeare-an komedion „Somermeznokta Songo”, prezenteb-lan al plenkreskuloj. Pri la premioj de la festivalo decidis tie ne nur plenkreskula, sed ankaŭ infana internacia juĝistaro.

— Kio estis via plej kara premio?

— La „infana ĝojo”, kiun, inter pluraj, ni gajnis jam pluroble. Jes, ni ludas ja por infanoj, do la plej bela rezulto estas vekti en ili ĝojon.

— Kion vi prezentos ĉi-jare?

— Kvankam el la diversnaciaj, rumanaj, bulgaraj, ĉeĥaj, anglaj ktp. ensembloj ni estis ĝis nun la plej stabilaj en ĉiu jaro, ni devas manki ĉi-jare en la festivalo, ĉar



ĝi okazos en oktobro; kiam ni estas ligitaj al Budapeŝto per niaj pupteatraj prezentadoj ĉi-tieaj.

— Kaj ĉu venontjare?

— Tio dependas ne de ni, sed de la cirkonstancoj.

— Kaj kiel plu?

— La prepariĝo bezonas de jaro al jaro lacigan laboron, multan energion. Mi faras tion, ĉar mi estas entuziasma adepto de Esperanto. Ni prezentadas la artan produktaĵon en Zagreb, sed poste okazas apenaŭ pli ol nenio. Ni devas klopodi je tio, ke ni ricevu helpon por gajni la eblon roli por la Budapeŝta esperantista publiko kaj ankaŭ por la provinca.

Vere, bela intenco! Tiu arta laboro de la pupteatristoj estas parto de la naskiĝanta, disvolviĝanta kulturo de Esperanto. Oni devus bone mastrumadi per tiu kulturo. La pupteatristoj devus ricevi la eblojn prezenti sian arton en urboj kaj en lernejoj, kie oni instruas E-on. Sed ne nur tie. Oni devus klopodi por tio, ke kreiĝu kontaktoj kun la E-asocioj de la najbaraj landoj por organizo de gast-roladoj. Temas ja ne nur pri nacia sed pri internacia valoro.

István KOVÁCS

Utiligo de niaj termo-akvojn helpe de UN

Nia riĉeco je termoakvojn estas konata: 415 niaj putoj kaj fontoj liveras termoakvon super 35°. Sed la varmoenergio ne estas kontentige utiligata. Ĉirkaŭ la duono de la termoputojn nutras banejojn, kelkan parton uzas la agrokulturo kaj industrio, sed multaj putoj estas tute ne fruktuzataj. Tion oni esperas plibonigi helpe de UN.

UN havigas al ni monhelpon de 7.5 milionoj da dolaroj sume, ekde 1973. El tiu sumo oni financos interalie la prilaboron de la regiona plano koncerne la kuracan-refreŝigan kaj fremdultrafikan utiligon de la termoakvojn.

Fakte, la speciale riĉa sortimento de niaj termoakvojn estas rara trezoro nacia. Por malsanulojn de la nuna trostreĉita vivritmo kaj por suferantojn de artritaj doloroj niaj termoakvojn donas bonegan eblon de kuraciĝo.

Nia lando situas avantaĝe preskaŭ meze inter la norda-suda kaj okcidenta-orienta fremdultrafiko. Por ne esti nur „traira domo” por turistoj, ni intencas krei medion, en kiu la ekster- kaj enlandaj gastoj fartos bone. Tial jam prepariĝas la vastaskala teĥnika-ekonomia planpropono.

UN agnoskis, ke la graveco de nia termoakva programo etendiĝas trans niajn limojn, kaj tial ĝi pretas helpi la aferon per maŝinojn, instalaĵojn, eksterlandajn ekspertojn, studvojaĝojn. Ĉe la investado ni konsideras unue la enlandajn eblojn, sed, baze de reciprokaj avantaĝoj, ni pretas utiligi ankaŭ eksterlandajn financajn fontojn. La planadon partoprenas la Ministerio de Konstruaj kaj Urb-evoluigaj Aferoj, la Tutlanda Akvoafera Oficejo, la Sanitara kaj la Internkomerca Ministerioj. Por akordigi ilian laboron kun tiu de UN, estis starigita „Kontoro Project”.

Kio rezultos el la komuna laboro? Certe, ĝojiga evoluo de nia fremdultrafiko, speciale tiu de la kurac-turismo, plilongiĝo de la refrerŝiga sezono, malpliĝo de la senproportio inter la fremdultrafikaj terenoj.

István LASZLÓ

Kultura plano de la fergisa brigado „Paco” de la Budapeŝta Maŝinfabrika „4-a de aprilo”

En la numero de la 12-a de majo 1974 de Népszava (Popolvoĉo) ni legis interesan artikolon pri la Internacia Lingvo. Tiu ĉi artikolo proponas al la socialismaj brigadojn enkadre de sia kultura plano lerni Esperanton, kiu estas facila lingvo, kaj prezentas multajn avantaĝojn al siaj uzantojn. Ni konsideris la aferon, kaj nia brigado en sia kunsido, okazinta la 17-an de majo, decidis jene: krom la sindevigojn, kiujn ni akceptis koncerne la plibonigon de nia laboro en la uzino, ni entreprenas enkadre de la laborkonkurso omaĝe al la 10-a Kongreso de la Hungara Socialisma Laborista Partio kaj la 30-a datreveno de la liberiĝo de Hungario, dum la lernojaro komenĉigonta ĉi-septembre, ellerni Esperanton, kiu ŝajnas la plej taŭga por la rolo de internacia lingvo.

Ni agas tiel, ĉar ni estas konvinkitaj, ke ni, laboristoj de grava metio povas ĉerpi multan profiton el la scio de fremda lingvo. Konvinkinte kun la karakterizaj trajtoj de la lingvo Esperanto kaj kun la rezultoj de la movado, ni pensas, ke tiun ĉi lingvon, kiu estas la plej facila kaj alproprigebla en la grado de korespondado kaj ĉiutaga konversacio dum relative mallonga tempo (4—8 monatojn), ni ankaŭ povos ellerni. Ni estas konvinkitaj, ke al niaj leteroj, serĉantaj amikojn en la frataj socialismaj landoj, baldaŭ venos la unuaj respondoj, kaj krom la perkoresponda kaj persona interkonatiĝo ni povos ricevi ankaŭ valorajn fakajn spertojn el eksterlandaj fergisejoj, kiujn ni povos utiligi por la plibonigo de nia laboro. Ni opinias, ke nia kultura laborplano efektive pliigos niajn konojn kaj malfermos antaŭ ni la mondon. Ĝi faros efektiva, persona travivaĵo la internaciismon, kaj ebligas senperan interamikiĝon kun samfakulojn kaj homojn, pensantaj simile, kiel ni. Ni agas en la spirito de la noblaj tradiciojn de la laborista movado, ja Esperanto en nia lando kaj ankaŭ en pluraj aliaj ludis pozitivan rolon en la leĝa kaj neleĝa laborista movado dum la lastaj jardekojn.

Ni ĝojus, se nian decidon imitus kiel eble plej multaj brigadojn en Hungario, kaj se ĝi trovus eĥon kaj imiton ankaŭ en aliaj socialismaj landoj. Estas jam tempo agi por ĉesigi la situacion, ke la procentaĵo de parolantojn de fremda lingvo estas la plej malalta inter la laboristoj kaj kamparanojn. Ni mem ne plu deziras aparteni al tiu kategorio de la homoj, kiuj dum renkontojn kun siaj alinaciaj homfratojn kaj kamaradojn provas „komprenigi” sin per profunde humiligal grimacojn kaj gestadojn, kiuj kapablas nur kun amika rideto manpremi, sed eĉ unu frazon ne interŝanĝi unu kun la alia.

Ni konsideras tion malinda, kaj ni pensas, ke la homo de nia epoko havas la rajton kaj devon interkompreniĝi kun la filo de kiu ajn nacio. Inter la laboristoj, laciĝantaj ĉiutage per la peza fizika laboro, troviĝas nur malmultaj, kiuj havas energion por dediĉi plurajn jarojn al la alproprigo de malfacile ellernebla fremda lingvo. Laŭ nia opinio Esperanto estas la plej taŭga lingvo por tiu celo. Ĝi estas nenies gepatra lingvo, neniu povas senti superecon parolante ĝin, ĉiuj devas trairi la saman vojon por posedi ĝin. Ĝi estas neŭtrala lingvo. Ĝi ofendas la memrespekton de neniu popolo, neniu homo, kaj tiel ĝi povas fariĝi la dua gepatra lingvo de ĉiam pli da homoj, kaj povos plenumi en la signife vastiĝintaj internaciaj rilatojn la rolon de la interlingvo, kiu estas de tago al tago pli malfacile malhavebla.

István Tóth, brigadestro, Bertalan Koszti, Agota Csordás, Istvánné Tóth, Sándor Bánfi, János Morancsik, László Szajkó, Lászlóné Szajkó.

(Trad. V. B.)



Vaci II. infanĉambro


La dimensioj de la garnituro: 4082 × 1199 × 1199/454 mm.


La ŝrank-kombinaĵo enhavas unu vestŝrankon, du sidiletojn kaj unu komponeton kun pordo, tirkesto kaj skriboplato. La komponentoj, diference de la ordigo, videbla sur la desegnaĵo, estas kunmunteblaj ankaŭ en alia kunmetado.

La vestŝranko estas provizita per du, flanke malfermeblaj pordoj, dividita per vertikala rando, en unu triono bret-hava, en du trionoj kroĉil-hava. La kroĉil-hava parto entenas glithokaron, tireblan perpendikle sur la glataĵon de la ŝrank-kombinaĵo.

La du ŝrank-kuŝiloj servas en fermita stato kiel foteloj, malfermite kiel kuŝlokoj. La dimensio de la kuŝilo estas taŭga ankaŭ por kuŝejo de plenkreskuloj, ekzemple mebligi somerdomon. Post la eliro de la kuŝiltirkesto la duobla laticela somiero estas malfermebla du-direkten kaj la dorsapogilo estas lokigebla por fariĝi kapapogilo. La kuŝil-tirkesto kaj la ŝrank-parto malantaŭ la dorsapogilo, provizita per malferma pordo, estas uzebla por rezervi la litajon.

La skriboplata komponento estas enkonstruebla inter la du ŝrank-kuŝilojn, aŭ — en alia kunmetado — inter unu el la ŝrank-kuŝiloj kaj la pord- kaj tirkesthavan ŝrankon. La alteco de la skriboplato estas ŝanĝebla laŭ la kresko de la infano ĝis la alteco 594—754 mm-oj. La breton super la skriboplato kun la aldonitaj ŝrankoj oni povas fiksi en la dezirata alteco.





Ŝrank-kombinaĵo „Daisy”

La dimensioj de la ŝrank-kombinaĵo: 3497 × 1804 × 435 mm.

La ŝrank-kombinaĵo konsistas el 4 samprofundaj komponentoj.

La vestoŝranko estas provizita per du „flankmalfermiĝaj” pordoj, en ĝia interna parto troviĝas ĉapeltenilo, eltirebla perpendikle sur la vand- kaj frontglataĵon, kaj du pecoj da glitvesthokaroj. La ŝrankpartoj estas kunkonstruitaj, en la supera kaj malsupera kvadronoj de la unua komponento provizitaj per po 2 malfermaj pordoj, meze malfermebla pordo malsupren (Barŝranko).


La dua komponento havas „flankmalfermiĝan” pordon, (3 × 2) en la meza kaj supera partoj kun bretoj, konvenaj rezervi tolajon.

La tria komponento estas pli mallarĝa ol la antaŭaj du, estas 582 mm-ojn larĝa. En la supera parto ĝi estas „malfermporda”, meze kun malfermita breto, malsupre kun tri tirkestoj.

La ŝrank-kombinaĵo estas bone lokigebla ankaŭ en etaj loĝejoj, varia, kaj ebligas vastan lokon por ŝarĝado. La speciala dimensio kaj reprezentativa aspekto ebligas ĝin mebli loĝoĉambrojn, oficejojn, klubejojn.

La elegantan kaj bone uzeblan „Daisy” (junularan) ŝrankkombinaĵon la planistoj destinis unuavice en la ĉambreon de junaj geedzoj.

La lignosimila artefarita folio faras konvenan transiron al la aliaj mebloj de la ĉambro, kiuj estas supozeble plakajkovritaj.



REVUO DE REVUOJ

Ce la vido de la gazeto NOVZELANDA ESPERANTISTO, eĉ en nia epoko, kiam la jet-aviadiloj tiom etligis nian globon, mi sentas la altiron de ekzoteco (maorioj, lag-regiono, nestorpapagoj, kivi-birdoj ktp.). Kaj jen estas ekzotulo inter la artikolantoj de la gazeto: *Jozefo Major*, eksbudapeŝtano, eks-Niponano. Lia artikolo estas interesa precipe pro tio, ĉar li malkaŝe sin konfesas en ĝi aŭtoro de la iama fama japana rezolucio kontraŭ la neologismoj. Fiere li deklaras, ke sen lia tiama agado PIV estus ankoraŭ pli dika. Mi nur ne komprenas, kial li uzas en sia artikolo la vorton „vestiĝo”, troviĝantan nek en PV nek en ties Suplemento, nek eĉ en la Parnasa Gvidlibro, kies neologismoj tiom ekscitis lian fantazion, ke li eltrovis la frapterminon „okcidenta vortimperialismo”. Mi notas ankoraŭ, ke la japanoj, de kiam ili liberiĝis de li, tiom sin izolis disde tiu rezolucio, ke en la Okamoto-vortaro ili konsciencie kolektis ĉiujn ie ajn troveblajn neologismojn, kaj ke ĵus mi legis en japana gazeto la vorton *suicidio* troveblan nur en PIV. — Alia artikolanto, J. H., tiel same okupiĝas pri la neologismoj. Li skribas, ne timante troigojn, ke ilia nombro jam superas kelkajn centojn, kaj, se tiel ni progresos, post kelkaj jaroj ili atingos milojn. Li eĉ kunmetas, tre eltroveme, frazon el 50 vortoj, en kiu troviĝas 13 neomonstroj. Sed li ne pensas pri tio, ke tiuj kelkcent vortoj amasiĝis en la lingvo en minimume kvardek jaroj, sekve, kelkmil vortoj, laŭ la sama progreso, bezonus por enhejmiĝo tempon dekoblan, t.e. kvar jarcentojn. Aliflanke, mi trovas konsiderinda lian proponon, ke la E-aj eldonistoj devus esplori la E-an publikan opinion pri tio, kiajn librojn la esperantistoj deziras legi, kaj ke poste oni devus eldoni librojn konforme al la rezulto de tiu esploro. Tiaĵon, cetere, jam faris la redakcio de Literatura Mondo kaj kun ne malbona rezulto.

En ESPERANTO de UEA (nro 7—8) temas ĝuste pri tiu sama Literatura Mondo; la artikolanto, *W Auld* ĝin nomas „heroa revuo”. Kaj li raportas, ke japana entrepreno represos ĉiujn ĝiajn numerojn, kune kun ĉiuj ĝiaj neologismoj, en ses volumoj: la unua pretiĝos en ĉi-jara aŭgusto, la lasta en printempo de 1975. Ĉu mi nun ĝoju aŭ ĉagreniĝu? El la zamenhofa proverbo: „Neniu estas profeto en sia urbeto” mi emas fari la varianton: „Neniu estas profeto en sia tempeto”. Mi pensas pri la multaj artistoj, poetoj, verkistoj, kiuj vivis mizere kaj per kies kreaĵoj poste lertulo riĉiĝis. Kaj mi pensas pri la tempoj, kiam Literatura Mondo vivis, kaj kiam la redaktoroj faris de numero al numero subten-alvokojn retorike ne malindajn al Demosteneno, Cicerono, Mirabeau kaj Lapenna. Kaj ke V. Bleier, la eldonisto de L.M., estis la lertulo de lertuloj kaj li tamen ne riĉiĝis. Poste mi pensas pri nia povra HUNGARA VIVO kaj bedaŭregas ne ĝisvivi la tempon, kiam oni ĝin represos kaj nomos „heroa revuo”. Nun oni ne tre nomas ĝin tia, eĉ tute ne nomas ĝin, kvankam mi trovas inter la revuotaj t.n. E-aj revuoj multajn, kies malpleno min afliktas, kaj kiuj povus altiĝi sian nivelon kaj pliiĝi sian interesecon per

bela, ronda amplekseta artikolo pri Hungara Vivo. Nu, ĉar ĝis nun mi vane serĉis ion tian en aliaj revuoj, mi decidis defie, ke mi mem verkos pri nia Hungara Vivo ĉi tie.

Mi do verkis vastan traktaton pri tio, kiel multkolora kaj interesa kaj modernaspekta estas H.V., kiel ĝi okupiĝas pri aferoj komuninteresaj por esperantistoj (E-a poezio, prozo, dramo ktp.), kiel ĝi publikigas verkaĵojn de eksterlandaj E-istoj, sed venis mia amiko Gal kaj diris proverbe: „ĉiu vulpo sian voston laŭdas”. Sub lia influo mi forstrekis la tutan panegiran apologion kaj decidiĝis por surmeto de nigraj okulvitroj (kiel se oni rigardas en la sunon). Pro manko de spaco mi povas paroli nur pri du sunmakuloj. *G. Vigh* (nro 3.) postulas generon de denaskaj E-aj poetoj, sed bedaŭrinde forgesas nin sciigi: unue, kiaj cirkonstancoj estas necesaj por tia naskigo; due, kio garantios, ke la denaska poeto ne delogiĝos poemi nacilingve. Krome li agitas por senrimaj versoj, kvazaŭ por ia novaĵo en E-o, kvankam en la Streĉita Kordo de Kalocsay aperis tiaj jam antaŭ pli ol 40 jaroj.

Edwin de Kock samnumere agitas kontraŭ la „tradukisma manio” kaj skribas, ke la traduko de la „Floro de Malbono” estas poezie nemulte valora kaj taŭga nur por akumuli polvon sur la librobreto. Tamen mi legis lian recenzon pri la traduko de la „Somermeznokta Sonĝo” kaj en ĝi sub cititaj versoj staras la entuziasma krio: Tre Ŝekspira! Laŭ lia ekzemplo mi prenis la Baudelaire-an volumon, legis tradukojn de tri poemoj (ne miajn) kaj post ĉiuj tri mi ekriis: Tre Baudelaire-a! Li nomas la tradukojn el la angla, franca, hungara „kunŝraŭbitaj kaj senvivaj metrikaĵoj”. Eble, ĉar en neniu troviĝas tia eufonia verso, kiel la lasta verso de lia soneto: „al kiu mort’ stas ŝajno, ŝanĝ’ fiktivas”. Ankoraŭ unu demandon: ĉu li ne havas kulp-konscion pri tio, ke pro lia neglektemo nenion ni scias pri la afrikansa poezio?

JES SED, eldonata de la Studenta Esperanta Klubo de Zagreb (2, 74) havas sur la titolpaĝo primitivan, tamen emocian bildon: „Floro el Vjetnamia fajro”. *T. Zlatko* respondas mian demandon, kiamaniere atingi rezultojn similajn al PIF kaj listigas laŭdinde multajn eblojn, sed bedaŭrinde finas jene: „La esenca problemo estas junaj entreprenemaj homoj, kiuj ĉefe mankas al la movado”. Jen do la gordia nodo, sed kie estas Aleksandro? Espereble *T. Zlatko* respondos ankaŭ ĉi lastan demandon. *T. Zlatko* verkis artikolon ankaŭ pri lingvistiko. Ho ve! En ĝi per matematikaj ekvacioj enhavantaj ekzemple la duan radikon de la kvara potenco de 4 x li pravas, ke la diversaj lingvoj, kiel ajn diversaj estas iliaj esprimformoj, la samon tamen esprimas esence per samo. Tio, se mi bone komprenis, signifas, ke „la kato manĝas la muson”, en neniu lingvo estas tiel esprimita, ke la senco estu: „la muso manĝas la katon”. Eble mi miskomprenis la tezon, sed ties kaŭzo verŝajne estas, ke la dua ekvacio misanstataŭas la unuan: dekstre devus esti ne a^2 , sed a^4 . Ho, sankta Chomski!

Responde al Edwin de Kock

Antaŭ la impona klero de mia ŝatata kolego E. de Kock (skribebla kurte kaj oportune E. 18), kiu konstatis „centojn da vanaj provoj” traduki poemojn en amason da lingvoj, kaj aljuĝas unikan premion al unu traduko el la persa en la anglan, mi hezitas veni kun mia eta kaj mizera lingva ekipo, sed kelka komento ŝajnas tamen dezirinda.

Komence mi tuŝas tri liajn terminojn, kiuj faras al mi problemojn. Unue li nomas la ĝeneralan tradukpoezion en Esperanto „substandarda” kaj pri tio mi vere frotas la kapon, ĉar la sola substandarda poemo, kiun mi konas estas ĝuste „Preĝo sub la Verda Standardo” kaj ĝi estas, ho ve, ne traduka, sed originala. Due li nomas nian poezi-recenzadon „amatora” — sed ĉu vere la manko aŭ havo de salajro mezuras la nivelon de la produkto? Trie li kondamnas Kalocsayn ĉar tiu nomis Esperanton sia „nobla hobia”. Amiko E. 18 pripensu nur, kiom da sciencaj kaj belartaj pioniroj estis ĝuste amatoroj, kiom da homoj faris en sia profesio nenion signifan kaj en sia hobia produktis la plej gravajn fruktojn de sia spirito, kaj li tuj vidus, ke la terminoj „amatora” kaj „hobia” estas minimume indiferentaj por lia tezo kaj maksimume refutaj por ĝi.

Plue, E. 18, pro sia juĝo inter la franca *Les fleurs du mal* kaj ĝia esperanta traduko postulas, ke traduko egalas la originalon por entute havi valoron. Alie oni simple ellernu ian manplenen da lingvoj (ni diru 50 aŭ 100) kaj legu la originalojn. Mi tamen garantias ke, eĉ sen tiuj kondoj, kiu ajn legos la jenajn tradukojn el la angla, spertos poemon superan je la originalo:

Soneto el sanatorio

(Ferguson—Dinwoodie)

Al Cynara (Dowson—Auld)

Sándor Szathmári

1897—1974

La morto, kiu kutime estas kruela kaj senindulga, por li estis saviĝo. Ĝi savis lin el la korpa kaj spirita kadukeco, el la familia kaj socia soleco en la neniigo. La turmenta kaj mistera malsano ja senigis lin dum la lastaj jaroj je la kvintesenco de lia vivo: je la krea pensado.

Li mortis soleca. Jes ja, li ne estis homo societema, ne konis la rafinitajn manierojn de la afabluma hipokriteco, lia sincereco ofte ŝanĝiĝis je vera ofendo. Jes, ofendo, sed neniam malprava. Lia karaktero multe similas lian ĉefverkon, la romanon *Vojaĝo al Kazohinio*: li estis homo verema, justa kaj senkompromisa.

Li havis vivon malfacilan. Dum la tuta vivo laboris kiel maŝin-ingeniero en posteno malalta kaj malbone pagata. Li estis tro fiera por atingi promociigojn en la profesia vivo, kaj la sama trajto lin malhelpis trovi por si lokon en la hungara literatura vivo. La kvar hungarlingvaj eldonoj de lia romano kaj la apero de la hungarlingva traduko de *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj* ebligis nur dank’ al la intervenado de lia bona amiko, la renoma hungara poeto kaj verkisto Dezső Keresztúry.

La gvidstelo de lia vivo estis la senrezerva respekto de la homa racio. El ĝi li esperis saviĝon por la homa gento, kaj tiu sama eco lin kondukis tre frue inter la esperantistojn. Li esperis renkonti en nia movado kolektivon, kie jam venkis la racio, kaj mankas el la homoj ĉiaspeca *behinaĵo*. Bedaŭrinde tiu lia espero ne povis realiĝi, tamen li restis fidele inter ni ĝis la fino de sia vivo. Lia renkonto kun la esperantistaro estis tamen fruktodona por ambaŭ flankoj: nia literaturo gajnis por si verkiston neordinaran, kaj liaj grandaj verkoj trovis, almenaŭ en la kremo de la esperantistaro, komprenkapablajn legantojn.

Inda vartado de lia memoro estas nepra devo de la hungara kaj internacia Esperanto-movado. Oni devas gardi lian memoron de ĉio, kio estis fremda al lia spirito. Ni omaĝu al lia memoro per la kiel eble plej baldaŭa eldono de liaj postlasitaj manuskriptoj.

Vilmos BENCZIK

La sonoriloj (Poe—Kalocsay).

Sed pravigo de la poem-tradukado ne dependas finfine de tiaj raraj esceptoj. Ĝi konsistas en perado de kulturoj. Ĝi konsistas en tio, ke la leganto spertas estetikajn travivaĵojn analogajn je la originalo. Kiam mi larmis de ĝojo legante la *Inferon* de Kalocsay, tio sigelis por mi la sukceson de lia peno. Kiam la Kvaropo laŭtleĝis inter si la manuskripton de *La bapto de Caro Vladimir* (Havlček—Pumpr), ĝue ridegante, dum mi deklaris „Mi ne kredas, ke oni povus traduki tion en la anglan” kaj Auld blage ripostis „Mi ne kredas, ke oni povus ĝin traduki en la ĉefan!”, tio atestis trium-

fan kultur-peradon. Per tiaĵo oni povas sperti ekzemple la miraklon de la hungara poezio, kiel angle oni ne povas. Multobligitajn kazojn fariĝus teda katalogo. Sed sen tiaj altaj tradukoj, nu eble nia poliglota Edwin 18, sed certe nek mi nek miloj da aliaj sciis penetri la fermitajn pordojn de fremdaj ĉefverkoj poeziaj kaj prozaj. Esperanto estas kulturtrafiko kun du aspektoj: rekta (la originala) kaj interpretita (la traduka). Alivorte, ĝi estas normala lingvo, unika nur en sia rolo kaj potencialo. Sur tiuj nekonkureblaj kvalitoj apogiĝas ĝia nuno kaj ĝia estonto.

Reto ROSSETTI

Dua, revizita eldono. Eldonejo EROTO, Rotterdam, 1972. 52 p. 21 x 13,5 cm. Broŝurita. Mimeografita. Prezo: 2,94 gld.

La volumeto estas dediĉita al la mistera aŭtoro de la fama kolekto de erotikaj poemoj Peter Peneter, sed jam la dediĉa soneto malkaŝas, ke la aŭtoroj ricevis malpli da graco de la muzoj, ol la fi-fama antaŭulo.

La kolekto konsistas nur el originalaĵoj de pseŭdonimaj aŭtoroj — *Karma Sutro*, *Karna Voro kaj Tange K...* (ĉi lasta pseŭdonimo eble ofendus la guston de kelkaj legantoj: scivoluloj serĉu la vorton en PIV, kie laŭ la sagaca malkovro de Schwartz ĝi estas difinita jene: „*seskuniĝi kun virino*”).

La dediĉan soneton sekvas du erotikaj parodioj de *La Tagiĝo de Grabowski* kaj de *La Espero* sub la respektivaj titoloj *La Raviĝo kaj La Vespero*. Ili estas — precipe *La Vespero* — la plej sukcesaj pecoj de la volumeto. La du ceteraj poemoj — ambaŭ longaj versaj rakontoj de *Karna Voro* — elspiras rutinodoron kaj mankas el ili ĉiaspeca spico kaj sprito. Ne multe superas ilin ankaŭ la du prozaĵoj — *Leontodo kaj Dia logo* —; la unua troe volas aspekti alta literaturo, la dua same tuŝas tro seriozeme sian temon. Niaj aŭtoroj ŝajne ne bone lernis la ĉefan instruon de sia antaŭulo Peneter, ke erotikan temon oni tuŝu nur sprite, ĉar en serioza suko ĝi nepre kuiriĝos stomakprema banalaĵo.

Philippa Galloway: Skota legendaro.

Tradukita de Guy B. Tordoff. Antaŭparolo de John S. Dinwoodie. Ilustraĵoj de Walter J. R. Cook. Eld.: Fellowship Press, Gloucester, 1970. (Efektive en 1974.) 127 p. 20 x 16 cm. Bindita. Prezo neindikita.

Prezento de naciaj folkloraj trezoroj ĉiam estis ŝatata okupo de esperantistaj tradukistoj, kaj ne senkaŭze: tiamaniere la plej praaj literaturaj valorajoj de iu popolo fariĝas alireblaj por nia internacia publiko. Aparte estas ĝojinda la apero de folklorajoj de malgrandaj popoloj — kaj neniu kontestos, ke la skota klasiĝas tia.

La dek kvin legendoj, kiuj aperas en tiu ĉi kolekto, ĉiuj havas propre nordan kaj karakterize ombran atmosferon. La sereno mankas el tiuj ĉi verkoj, kiuj naskiĝis en lando, kie la suno malofte gastas kaj la spirito de la regiono loĝas en grandaj, mornaj rokoj kaj en la maro. Kompenzas tamen la unuflankecon de la atmosfero, ke ili ĉiuj estas literature valoraj pecoj, do, legiĝas kun ĝuo sen la deviga pietato. Aparte rimarkinda estas la poezie ondanta stilo, kiun bonege kaptis kaj rekrels esperante la tradukisto, *Guy B. Tordoff*.

RECENZOJ

Estas aparte menciindaj la multaj tre belaj ilustraĵoj, kiuj grave altigas la valoron de tiu ĉi havinda libro.

*

Ivo Lapenna: Por pli efika informado 22 x 17 cm. Broŝurita. Prezo neindikita.

La allog-aspekta, ilustrita broŝuro enhavas dek ses artikolojn de la eksprediganto de UEA. Konforme al la titolo la artikoloj pritraktas diversajn aspektojn de la informado pri la Internacia Lingvo, jen teorie (*Generalala kaj speciala informado, Konstanteco kaj kampanjoj*), jen tute praktike (*Interpretado, Kiel aranĝi ekspozicion*). Ĉiuj artikoloj atestas pri ĝisfunda konno de la temo, kaj niaj fakuloj pri informado povos bone utiligi ilin dum sia laboro.

La Vojo al Nirvano
aŭ *la Dhammapado.*

Tradukis el la Palia lingvo T. T. Anuruddha. Eldonita de la Bô-Tât-Csoma-Instituto por Budologio. Vung-Tau, 1973. 94. p. 13 x 19,5 cm. Broŝurita. Prezo neindikita.

Dhammapado, kies esperanta traduko estas *La Vojo al Nirvano*, estas unu el la sanktaj libroj de Budhanoj. Ĝi konsistas el 26 ĉapitroj kaj entute 423 paragrafoj. Ili enhavas filozofiajn konsilojn por Budhanoj, sed, kiel skribite en la antaŭparolo, oni ne devas esti kredanto de tiu religio — eĉ ne kredanto entute — por legi ĝin kun intereso kaj foje-foje kun utilo. Ĉiukaze, ĝi estas multe pli digestebla kaj penso-veka legfuraĝo por simpla, interesiĝema homo, ol la furorinta *La Nobla Korano*.

La traduko estas farita en korekta Esperanto, kaj nocioj, nekonataj por eŭropanoj, estas bone klarigitaj en piednotoj. Kvankam la traduko estas proza, la teksto ne malhavas sordinitan poeziecon, kio siavice ankaŭ agrabligas la legadon.

La libro — kiu cetere estas dediĉita al la memoro de la hungara scienculo Aleksandro Csoma de Kőrös, kompilinto de la unua tibetangla vortaro, estas modesta, sed valora kontribuo al la „interkonatigo” de Oriento kaj Okcidento.

Antaŭen al laboro:

Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, Kajero 3. Tempo de „Esperantisto” 1892—1895. Eldonejo Ludovikito, Kyoto, 1947. 350 p. 21 x 15 cm. Sur luksa papero, bindita. Prezo: 20 gld.

La redaktinto kaj eldonisto, kiu kaŝas sin sub la pseŭdonimo „ludovikito” (tiel, minuskle) prezentas al ni en tiu ĉi libro (kiel probable ankaŭ en la du antaŭaj) dokumentaron de la fruaj tempoj de la Esperanto-movado. Represigas ĉi tie artikoloj kaj leteroj de Zamenhof, kiuj senpere tuŝas la problemon de la progreso de la tiama Esperantomovado, kaj foje-foje ankaŭ rememoroj de aliaj personoj (ekz. Devjatnin), kiujn lastajn la redaktinto klopodas pritrakti kritike kaj ĝustigi eventualajn memorerarajn.

Dank’ al tiuj ĉi dokumentoj la leganto ricevas precizan kaj palpeble vivan bildon pri la heroa komenco, kiam la vivo aŭ la morto de la movado dependis de la sindonemo de kelkaj personoj. Guste en tio mi vidas la ĉefan virton de la volumo: ĝin bone povas utiligi esperantologo por scienca laboro, tamen ĝi restas interesa kaj atentostreĉa legaĵo por ĉiu esperantisto.

Aparte vive reliefigas la multflanka personeco de d-ro Zamenhof, kiu ne nur estis talenta lingvisto kaj poezie agordita homo, sed ankaŭ pacienca, persista kaj precizema organizanto se la neceso postulis — kaj dum kiom longa tempo ĝi postulis! — tion. La multegaj financaj raportoj, antaŭkalkuloj el lia plumo ĉesas esti ĉi tie seka rutinaĵo: el ĉiuj vortoj kaj ĉiuj ciferoj ondas al la leganto profunda kredo en la utilo de la farata laboro.

Bone kompletigas la libron praktike faritaj indeksoj kaj sprite, inventeme aplikitaj ilustraĵoj. Ĝi estas libro, kiu kune kun la antaŭaj du volumoj (*Unuaj libroj por esperantistoj kaj Ni laboru kaj esperu*) kaj la promesita kvara (*Kelkaj el la unuaj pioniroj*) devus troviĝi en ĉiu grupa biblioteko.

V. BENCZIK

Aperis majstroverko mondliteratura!

Nuda inter lupoj


de BRUNO APITZ, tradukis d-ro KARL SCHULTZE, lingvekontrolis JERZY GRUM.

Sur 480 paĝoj temas en verva lingvaĵo pri la sorto de internigitoj lige kun eta infano en la fifama koncentrejo Buchenwald.

Atentokapta verko kun alta treĉo kaj animskua enhavo. Mendu ĝin tuj ĉe la eldonejo Edition Leipzig: 701 Leipzig Postfach 340. Sovetuniaĵoj ĉe Knigeksport, Moskvo A 183. 4-iy Novomichailkovskij proezd, dom n-ro 11. Esperantistoj de aliaj landoj ĉe la internaciaj librovendejoj. Esperantistoj el nesocialismaj landoj rekte sin turnu al la eldonejo.

La aperigo de „Nuda inter lupoj” estas atentinda evento en la refreŝiginta movado de la germanaj esperantistoj en GDR. Goje ni gratulas ilin, kaj al niaj legantoj ni varme rekomendas ĉi tiun valoran, belan libron.

Rebelis muĝe maro...



Ni citas el poemo de Petöfi „Rebelis muĝe maro...” (Traduko de K. Kalocsay, aperis en „Libero kaj Amo” poemoj elektitaj ĉe Libroeldonejo Corvina 1970.)

Ensendi sufiĉas nur la citaĵon ĝis la 15-a de januaro. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. Unua vico de la citaĵo, daŭrigo en la vicoj 1. vertikala, 98. kaj 40. horizontalaj kaj 68. vertikala. 16. Havanta unu saman volon, opinionon. 17. Titolo de konata, ne religieca Schubertkanto kies teksto estas de A. Storch verkita laŭ la poemo de Walter Scott: „The Lady of the lake” en la jaro 1825. (AVE MARIA). 18. Batadi (de la arterioj). 20. Simila, laŭ kelkaj rilatoj, al alia afero de malsama speco. 21. Kresto el roko, ŝtonetoj aŭ sablo proksime al la surfaco de la maro (Radiko). 22. Armiloj. 25. „Mister... aĉetas mil okulojn” originala E-romano de J. Forge. 26. Tre grandaj. 28. Kunvenoj de protestantaj pastroj, pri la ekleziaj aferoj. 29. Surprize. 30. Hele malvaj. 32. Silka teksaĵo kies unu flanko estas glata kaj brila (R). 33. Malŝate ridindigas. 34. Malbona antaŭsigno (R). 36. Ago havi en la mano kaj ne ellasi (R). 37. Superflua, ne produktanta efikan rezulton. 38. Elkreskanta tigo aŭ branĉo unuaksa kun folioj aŭ burĝonoj (R). 41. Scienca prefikso = nov-. 43. Nomo de la insulo kie estis arestita Monte Christo. 44. Nitrogeno, uranio kaj oksigeno. 45. MTA. 46. Turniĝo de aviadilo (R). 48. Lingva Komitato. 49. Respubliko en Sud-Ameriko. 51. Preme malĝojiga, malhela. 53. ... Prismo: titolo de E-revuo. 55. Forta enspiro en la nazon (R). 56. Artikolo. 57. Persona pronomo. 59. Piedvestoj. 60. Kontraŭo de la realisto (R). 63. Esti ies fakta aŭ leĝa posedaĵo. 65. Titano. 66. Radiumo. 67. Kunfiksilo. 69. Identaj vokaloj. 70. Sufikso por derivi femalon. 71. Sulfuro kaj oksigeno. 72. Konvena loko (du vortoj). 74. Adverbo. 76. Senvoĉeco pro malsaniĝo. 79.

Instrumento. 80. Ludo, konsistanta el rulado de lignaj kugloj per frapilo (R). 83. Granda cementa konstruaĵo, ujo por konservi furagon (R). 84. Difinita parto de kurbo (R). 86. Tipo de germanaj motorbicikloj kaj aŭtomobiloj. 87. ORR. 88. Ago doni bonan ekzemplon, inspiro virtajn sentojn (R). 90. Disiĝo de likvaĵoj. 93. Skrapu la kampon per speciala instrumento. 94. Genis per ne oportuna alesto aŭ insisto. 96. Cambio por akcepti gastojn, vizitantojn (R). 97. Meritanta ion.

VERTIKALAJ VICOJ: 2. Kunigi plurajn objektojn en unu tuton. 3. Transkapiĝos senvole. 4. Skandinava Aerlinia Societo. 5. Virseksa infano (R). 6. Montras subitan gajecon per sia vizaĝo. 7. Agis tiel same, kiel alia persono. 8. Interjekcio. 9. Protektinjo. 10. Ovforman kurbon. 11. Organo de reptilioj, mamuloj kaj birdoj. 12. Inklinaj. 13. Osto de la piedo super la kalkaneo (R). 14. Temantan pri amoro. 15. Senindulge severa. 19. Admiralo. 23. Solena malbeno de la eklezio. 24. Saman. 27. Adverbo. 29. Pagilo (R). 31. Juda profeto, liaj disĉiploj kredis lin la Mesio. 33. Nedifinitan kvanton da materio, kiun oni rigardas kiel tutajon. 35. Kiel 41. horizontale. 37. Malalta terparto inter montoj (R). 39. Kolerigi aŭ ĉagreni iun, malrespektante ties dignon. 42. Aperigi ekz. verkon. 44. Flavan akvovillon. 47. Poŝtofacejo. 50. Strato en franca lingvo (RUE). 51. Artefarita vizaĝo. 52. Nomo de la plej granda eŭropa montaro. 54. Kiel 50. 56. Persona pronomo. 58. Adjektiva tabelvorto. 61. Artikolo. 62. Havi en la manoj kaj ne ellasi. 63. Irvojo en ĝardeno aŭ parko. 64. Prefikso montranta ripeton. 71. Malfluida. 72. Strio da tero, tuŝanta etendaĵon da akvo (R). 73. Kastrita taŭro. 75. Gusta, konveneca. 77. Plenumanta la faritajn promesojn, ne trompanta la konfidon (R). 78. Nedifina adjektivo. 81. RU. 82. Skrapas la teron per speciala instrumento. 85. Ama intertuŝo de la lipoj. 86. Nuntempe. 88. Sufikso esprimanta la malplej altan gradon. 89. Abomeninda. 91. Kiel 4. 92. Rondforma elstara parto de organo (R). 93. Malagrabla impresio de seninteresiĝo (R). 95. Sulfuro kaj kalio. 97. Instrumento (R).

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 74/4 estas: PACON DE L' KONKORDO HAVAS KUN ĈIU GENT' DE NORD' KAJ SUDO POPOL' HUNGARA ĈE L' DANUBO.

Libropremion gajnis: Jürgen Berndt, 806 Dresden, Helgolandstr. 9/b, DDR; Maria Grochowska, ul Żabia 16 m 6, 15-448 Białystok, Pollando; Zombori Orsolya, 4024 Debrecen, Becskereki 18. I. 8.

EKZAMENO SENRISKO

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Cinumere nia enigmo traktos la libreton *Sercoj, rakontoj*. Kiel kutime, partoprenos la lotumadon de la libropremioj tiuj, kiuj alsendis ĝustan solvon minimume al du demandoj.

1. En iu noveleto en la libreto estas menciita ŝipestro, kiu antaŭ sepdek jaroj alportis tre valoran el la vidpunkto de la novelo donacon el Yokohama. Bonvolu alsendi la *nomon de la aŭtoro de la novelo*.
2. En iu el la ŝercoj esperantista poeto mencias la nomon de fama itala poeto. Bonvolu alsendi la *nomon de la du poetoj*.
3. Inter la tradukintoj de la sekcio *Fabeloj* troviĝas esperantista poeto de internacia renomo. Bonvolu alsendi la *titolon de lia poemaro, aperinta ĉe Stafeto*.

Solvoj de la enigmo en la numero 1974/4:

1. Pablo Picasso
2. La tuta Esperanto
3. 1001 noktoj

Limdato de la alsendo: La 31-a de januaro.

De Adisabebo ĝis Budapeŝto

De kelkaj monatoj ofta gasto estas en la Budapeŝtaj Esperanto-klubo alta, fortika Afrika junulo, kiu atente sekvas ĉiujn programerojn. Antaŭ kelka tempo, kiam en la Studenta Hejmo de TESCO (Internacia Teknika kaj Scienca Kunlaborado) fondiĝis Esperanto-grupo, li fariĝis la prezidanto de la plej internacia Esperanto-klubo de Hungario, eĉ, supozeble de Eŭropo. Lia nomo estas s-ro Haile Negash, sed por mi li estas kaj restas simple amiko Haile... Foje ĉe taso da kafo (kompreneble deveninta el la prahejmo de tiu beninda suko, el Etiopio, ja s-ro Negash estas etiopo) mi havis la okazon pridemandi lin pri lia vivovojo, kiu kondukis lin al Budapeŝto kaj al la Esperanto-movado. Post iom da hezitado li ekra-kontis:

— Mi naskiĝis en la jaro 1945, do, baldaŭ mi fariĝos 30-jara. Post la fino de la elementa lernejo mi ekstudis en gimnazio, sed baldaŭ mi devis ĉesigi la lernadon. Mi jam ne scias, ĉu bedaŭri, aŭ ne... Mi komencis labori, kaj tiam trafis en mian vivon renkontiĝo, kiu difinis mian agadon ĝis nun, kaj difinos ĝin verŝajne ĝis la fino de mia vivo. Nome, mi ekhavis kontakton kun la laborista movado... Sindikata movado antaŭ la jaro 1963 pro registara malpermeso ne ekzistis en mia lando, do ni devis konstrui ĝin preskaŭ el nenio, kaj el la lastaj eventoj en Etiopio vi povas vidi, ke ni ne laboris sensukcese... Ni faris ĉion, tamen plej kara por mi restas la tempo, kiam ni ekorganizis la laboristajn konsumkoopertivojn. Sciu, ke en nia lando komercistoj enpoŝigis profitojn milionajn, kaj tio multe ŝarĝis la laboristojn. Tiuj konsumkoopertivoj kompreneble ne ŝanĝis la socian sistemon, tamen certigis por signifa nombro de labo-



ristoj manĝaĵojn kaj industriajn varojn por grave reduktita prezo. Post tiu kampanjo mi laboris en pluraj sindikataj postenoj, ĝis fine mi estis elektita membro de la Etiopia Sindikata Konsilio, kiu nombras 25 membrojn... Grava ofico, vi diras? Jes, tre grava, ja oni konstante sentas la respondecon ne nur por la 20 000 membroj de la sindikata unuiĝo, sed ankaŭ por tiuj laboristoj, kiuj ankoraŭ restas ekster la organizaĵo. Ĝuste tiu ĉi Konsilio sendis min al Hungario por ke mi akiru fakan scion, kiu ankaŭ necesas por bona sindikata funkciulo. Mi studas elektroteknikon, dank' al la stipendio, kiun disponigis al mi la Hungara Sindikata Konsilio. Aparta ĝojo por mi estas, ke mia membreco en la Konsilio ne ĉesis kaj laŭ la eblaj mi klopodas partopreni en ĝia laboro... Ĉu Esperanto? Mi trovas natura afero, ke mi fariĝis esperantisto, ja la internacia solidareco de la laboristaro nepre bezonas neŭtralan internacian lingvon. Mi esperas fariĝi „apostolo” de la esperantista movado en mia lando... Kompreneble mi dediĉos min unuavice al la varbado de laboristoj... Nu, sed ankoraŭ kelkajn jarojn mi ĝuos vian gastamon... Sed eltrinku vian kafon, ĝi malvarmiĝos.

V. B.



Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XIV. jaro. 1974. 6-a numero

Cefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoro:
D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai,
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada
Császár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy,
d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan,
Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó,
d-ro István Szerdahelyi,
Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Cefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi,
Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko
Kökény, Lajos Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon kaj la unuan kaj trian ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la dua ĝis la kvina horo havas akceptotagon.

Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078

Eldonas: „Népszava” Gazeteldona
Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi
út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor
direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoŝtancoj, ĉe la gazetkolektistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj)
Ft. 48.—, al eksterlando krome
Ft 9.60 por afranko.

74.3832 Dürer Nyomda
Gyula
Indexszám: 25.377

HOSSZU

fecske




**FÜSTSZŰRŐS CIGARETTA
ÚJDONSÁG**

Fumfiltrila cigaredo — novajo



Consumerist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto
I. Hess András tér 3

Hotel Intercontinental-Hotel Gellert
VI. Népköztársaság utja 27.